MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN

HUNGARA VIVO

4
1984
13,– Ft

Tegita meblokompleto

MARIKA

ĜI AĈETEBLAS EN LA MARKOVENDEJOJ DE

BUDAPEST

Budapest, III, Ezüsthegyi út 2.
VII, Rózsa F. u. 4-6.
VIII, Baross u. 75.

Eger, Dobó tér 8.
Gyula, Felszabaditók útja 79.
Jászberény, Lazovi u. 2.

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyermezŏ u. 6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193. H-1368
Aperas dumonate
XXIVa jaro, 1984 n-ro 4
(116)

ENHAVO

Pri la evoluigo de la ekonomia direktado 122
Prezoj kaj salajroj en Hungario 1950-1982 124
Konsumado de nutraĵoj en Hungario por persono 124
Departemento Veszprém 125
Versteegh, K. Piĝiniĝado, kreoliĝado kaj Esperanto (*József Kiss-Horváth*) 127
Szakonyi, K.: Ili parolas pri la kvara (*K.Kalocsay*) 131
Juhász, Gy.: Ĉu amo? (*V. Benczik*) 133
Bornemissza, P.: Estas ploropreme (*I.Szabó*) 133
Sipkov, G.B.: Ĉu IRET aŭ SAESTR? 134
Unu poemo – en tri tradukoj 136
Avar, P.: Kiam mi estis homo 137
Heide, Z.: Al okuloj viaj blindaj 139
Panoramo 140
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 143
Bálint, Sz.: Fabelo pri kolomboj 144
Kořinek, J.: Stumble inter ismoj 145
Kalocsay, K.: Eroŝenko, la blinda mondmigrulo 146
Thur, O.–*Gyerkó*, Gy.: Por protekti la akvojn – Modernaj klorgas-enigiloj (*E.Fenyvesi*) 149
Recenzoj 154
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo 158
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 159
Leterkesto, Korespondi deziras 160

Sur la frontpaĝo foto de Z. *Fejér*

Abundas literaturaj...

pecoj en tiu ĉi 116-a numero de Hungara Vivo. Aperas eĉ du noveloj: unu tradukita el la hungara lingvo, kaj unu verkita originale en Esperanto. *Ili parolas pri la kvara* de Károly Szakonyi prezentas psikologie tre nuancitan bildon pri aĝaj homoj, pri ilia pensado kaj kondutmaniero, temo tre aktuala nuntempe en Eŭropo almenaŭ. La originala Esperanta novelo de Pál Avar kun sia tre karakteriza atmosfero trovos plaĉon unuavice ĉe la ŝatantoj de la moderna prozo.

Abundas ankaŭ poemoj – originalaj kaj tradukitaj. Ni faras en tiu ĉi numero eksperimenton, aperigante tri tradukojn de la sama poemo; ni invitas la versamantojn letere esprimi sian opinion pri la tri interpretoj.

Kálmán Kalocsay kreis grandegan vivoverkon, el kiu ankoraŭ restas neaperintaj pecoj. (Ankaŭ la supre menciita Szakonyi-novelo estas lia traduko.) Tre specifa parto de lia vivoverko estas liaj prelegoj, kiuj dum aŭtuno aperos libroforme sub la titolo *Dek prelegoj.* El tiu ĉi volumo ni ĉerpis specimene *Eroŝenko, la blinda mondmigrulo,* en kiu prelego li tre vidige prezentas la aventurplenan vivon de tiu ĉi klasikulo de la Esperanta literaturo.

Interesiĝantojn pri lingvistikaj demandoj certe profunde impresos la studo de profesoro Versteegh pri la piĝiniĝado kaj kreoliĝado de lingvoj. Verŝajne multaj ne konsentos pri liaj konstatoj kaj hipotezoj, sed pripensi liajn konsiderojn certe ne estos malutile por ni.

Iom amplekse ni prezentas la rezolucion de la Centra Komitato de la Hungara Socialisma Laborista Partio pri la mekanismo de la ekonomia direktado. Ni faras tion en la konscio, ke tiu ĉi rezolucio havos tre fortan influon por la evoluo de Hungario dum la sekvaj jaroj. Por la ŝatantoj de ciferoj ni aperigas du statistikajn tabelojn pri la evoluo de salajroj kaj prezoj, kaj pri la dimensioj de la persona konsumado. Ni estas certaj, ke tiuj du tabeloj por atentaj legantoj multe malkovros el la ekonomiaj kondiĉoj de vivo en nia lando.

Prezento de la pitoreska departemento Veszprém, raporto pri Pollanda studenta teatra renkontiĝo, ampleksaj recenzoj kaj la kutimaj rubrikoj kompletigas tiun ĉi numeron, kiu antaŭvideble atingos la Eŭropajn legantojn iam fine de aŭgusto.

Pri la evoluigo de la ekonomia direktado

REZOLUCIO DE LA CENTRA KOMITATO DE LA HUNGARA SOCIALISMA LABORISTA PARTIO

La 17-an de aprilo kunsidis la Centra Komitato de la Hungara Socialisma Laborista Partio, ĝi pritraktis la situacion de la hungara ekonomio, kaj akceptis Rezolucion pri la principoj kaj kadroj de la plua evoluigo de la ekonomia direktado. La Rezolucio trovis vastan eĥon ĉe la publiko, ĉar jam de pluraj monatoj okazas pri la temo vastaj diskutoj en fakulaj rondoj, kaj ankaŭ sur la paĝoj de la hungara gazetaro.

La projekton de la Rezolucio prezentis al la Centra Komitato Ferenc Havasi, *sekretario de la CK. Li faris ampleksajn komentojn pri la teksto de la projekto. El liaj komentoj indas citi precipe tiujn, kiuj koncernas la novajn formojn de la direktado de la entreprenoj: li atentigas, ke eksperimentoj por trovi taŭgajn formojn de la direktado okazas ankaŭ en aliaj socialismaj landoj; kaj la novaj formoj de la direktado signifos, ke la ĝisnuna* hierarkia *dependeco de la entreprenaj gvidantoj ŝanĝiĝos je demokratia dependeco. Tiuj baldaŭ enkondukotaj formoj de la direktado jam ĝis nun montriĝis tre taŭgaj ĉe la agrikulturaj kaj industriaj kooperativoj.*

Li emfazis, ke la rajton por la laboro la ŝtato devas certigi por ĉiuj hungaraj civitanoj, sed povas esti ke la disponeblaj laborlokoj geografie kaj laŭ la postulata kvalifiko ne nepre respondos al la deziroj de la personoj serĉantaj dungiĝon.

Li aludis ankaŭ pri tio, ke la kresko de la prezoj dum la pasintaj jaroj sufiĉe elprovis la komprenemon kaj pacienco de la hungara socio; pro tio necesas trovi kompromison inter la tolerkapablo de la socio kaj la ekonomia racieco.

Ĉi-sube ni konigas la ĉefajn punktojn de la Rezolucio, kiu tre grave influos la evoluon de nia lando dum la sekvaj jaroj.

1

En la *unua ĉapitro* la Centra Komitato emfazas, ke la karaktero de la ekonomia direktado devas esti konforma al la proprajoj de la lando. En Hungario la reformado de la ekonomia direktado komenciĝis jam fine de la jaro 1956; jam ekde la jaro 1957 la enspezoj de la laboristoj dependas esence de la ekonomiaj plenumoj de la entrepreno, kaj ekde 1959 ankaŭ la prezoj havas kunligon kun la efektivaj kostoj de la produktado. Tiu procezo atingis gravan punkton en la jaro 1968, kiam oni enkondukis aron da ekonomiaj reformoj, kies centra celo estis evoluigi la efikecon de la produktado. La Rezolucio substrekas, ke tiam ne ĉiuj entreprenoj kapablis disvolvi sian agadon konforme al la novaj principoj, ne ĉiuj entreprenoj respondis al la novaj postuloj; kaj aliflanke, ankaŭ la ŝtataj organoj de la ekonomia direktado ne ĉiam trovis la plej efikajn manierojn por sia agado. Rezulte de tio, kaj sekve de la intertempe malfavoriĝintaj internaciaj ekonomiaj cirkonstancoj, meze de la sepdekaj jaroj Hungario signife enŝuldiĝis eksterlande. Pro tio fine de 1978 la Centra Komitato decidis doni prioritaton al la internacia ekvilibrigo de la hungara ekonomio. Post 1978 la ekonomia direktado agadis konforme al tiu decido, kaj la rezultoj de tiu celkonscia agado alportis signifajn rezultojn.

La Rezolucio konstatas, ke dum la pasintaj ses jaroj la ekonomia politiko konvene akordigis la laŭplanan centran direktadon de la ekonomio kun la utiligo de la varaj kaj monaj rilatoj, ekzistantaj en la socialismo. Tiu ĉi akordigo de la du elementoj montriĝis taŭga, uzinda rimedo.

La Rezolucio konkludas, ke surbaze de la ĝisnunaj rezultoj necesas evoluigi la sistemon de la ekonomia direktado, utiligante la opiniojn, kiuj esprimiĝis en la lastatempe disvolviĝinta vasta socia debato de la temo.

2

En la *dua ĉapitro* la Rezolucio substrekas, ke dum la lastaj jaroj la ekonomia politiko de la lando celu unuavice la kvalitan aspekton de la produktado, la atingon de la internacia ekonomia ekvilibro de Hungario, kaj la konservon kaj postan altigon de la vivnivelo de la loĝantaro. Necesas, ke kresku la rentabilitato de la produktado.

La malfermiteco de la hungara ekonomio postulas, ke la hungaraj entreprenoj ekhavu senperajn kontaktojn kun la monda merkato. Por la hungara ekonomio havas elstaran gravecon la ekonomiaj kontaktoj kun Sovetio kaj kun aliaj ŝtatoj de la Konsilio de Ekonomia Interhelpo. Kun atento al la reciprokaj ekonomiaj avantaĝoj estas necese evoluigi la kunlaboradon kun tiuj ĉi landoj.

En la kazo de evolulandoj la eksporto de varoj kombiniĝu pli intime kun partopreno en la produktado en tiuj landoj. Oni faru klopodojn por

vastigi la importon el tiuj landoj, ja tio povas kontribui ankaŭ al la vastiĝo de la hungara eksporto.

Necesas signife kreskigi la eksporton al la evoluintaj kapitalismaj landoj, kaj trovi la manierojn por favora utiligo de eksterlanda kapitalo en la kreskigo de la hungara eksporto.

Por modernigi la hungaran produktostrukturon, necesas akceli la vastan aplikadon de la mikroelektroniko; daŭre utiligi la agrarajn eblojn de la lando, kun samtempa evoluigo de la koneksa industria produktado, servoj, esplorado kaj teknologioj; pliigi la eksporton de intelekta laboro, altnivelaj teknologioj kaj servoj. Necesas samtempe daŭre redukti kaj fine likvidi la produktadon senprofitan.

Por atingi tiujn ĉi celojn necesas plibonigi la laboron de la centra ekonomia direktado, kreskigi la rolon de la interna reguligita merkato, disvolvi la entreprenemon de la produktejoj.

3

En la *tria ĉapitro* la Rezolucio deklaras, ke la ĉefa ekonomia tasko de la ŝtataj organoj ankaŭ en la estonto estos la ellaborado de la ekonomia plano de la lando. Tiu ĉi plano esprimas la ekonomi-strategiajn principojn, certigas la kunakordigon de la ekonomiaj procezoj, kaj difinas la manierojn de la plenumo.

Estas necese, ke la ekonomiaj planoj estonte donu pli da atento al diversaj sociaj procezoj, al la bezonoj de la kulturo, publika klerigado kaj al la socialpolitiko.

Necesas krei modernan bankan sistemon, en kiu apartiĝu la funkcioj de emisia banko, de ŝtata financado, kaj tiuj de komerca banko. Necesas ellabori sistemon, kiu faciligas la racian movadon de la financaj rimedoj.

La Rezolucio starigas la jenan novan sistemon por la gvidado de la entreprenoj:

1. En la ĝisnuna sistemo funkciu kulturaj entreprenoj, entreprenoj de publikaj servoj, kaj aliaj entreprenoj, laŭ aparta decido de la registaro. Ĉe tiuj entreprenoj la gvidanton nomas la fondinta instanco; la gvidanton helpas en lia laboro la direktora konsilantaro kaj inspektokomitato.

2. Ĉe la mezgrandaj kaj kelkaj grandaj ŝtataj entreprenoj fondiĝu *entreprena konsilio.* La direktoron de la entrepreno nomu tiu ĉi entreprena konsilio, kaj ĝi havu la decipovon en ĉiuj ĉefaj demandoj de la entreprena strategio. La membroj de la entreprena konsilio estos la delegitoj de la laboruloj kaj la reprezentantoj de la entreprena gvidantaro. En la laboro de la entreprena konsilio partoprenos ankaŭ la sekretarioj de la partia organizaĵo, de la sindikata organizaĵo kaj tiu de la Komunista Junularo.

3. La malgrandajn entreprenojn gvidos *elektita gvidantaro.* Tiun ĉi gvidantaron elektos la kunveno de la laboruloj. Same tiu ĉi kunveno elektos la direktoron de la entrepreno.

4

En la *kvara ĉapitro* la Centra Komitato skizas la necesajn ŝanĝojn en la regulado de la ekonomio. La Rezolucio antaŭvidas simpligon de la ŝtataj intervenoj koncerne la eksporton kaj importon, pluan evoluigon de la prezosistemo, por ke la prezoj de la varoj kaj servoj pli reale respegulu la realajn kostojn, kaj ankaŭ la daŭrigon de la malpliigo de subvencioj al la produktado.

La Centra Komitato preskribas elastigon de la regulado de la entreprenaj enspezoj kaj salajroj, por ke la pli bone laborantaj entreprenoj kaj individuoj enspezu proporcie pli, ol la malpli bone laborantaj.

Necesas krei kanalojn kaj formojn por la manifestiĝo de la diversaj interesoj en la ekonomio, ĉar la diferenciĝo de la enspezoj antaŭvideble diferencigos ankaŭ la ekonomiajn interesojn de diversaj tavoloj de la loĝantaro. Sur tiu kampo havos gravan signifon la daŭraj konsultiĝoj de la registaro kaj de la reprezentantoj de la Nacia Konsilio de Sindikatoj.

La Rezolucio antaŭvidas enkondukon de unueca sistemo de individuaj laŭenspezaj impostoj. (Nun en Hungario el salajroj oni ne pagas impostoj. – La Redakcio.) La enkondukotaj impostoj ne povos malpliigi la averaĝan nivelon de la realaj salajroj.

Necesas instigi la moviĝemon de la laborforto kaj financaj rimedoj, por ke tiuj iru al entreprenoj, kiuj kapablas pli rentabilitate utiligi ilin. La Rezolucio taskigas al la centraj ŝtataj organoj kaj al la lokaj instancoj instrui pri nova laboro tiujn laborulojn, kiuj dum certa tempo aŭ daŭre ne povos trovi dungiĝon.

5

En la *kvina ĉapitro* la Rezolucio skizas la rolon de la partiaj organizaĵoj en la evoluigo de la ekonomia direktado. Laŭ tio la partio deziras havi esencan rolon en tiu laboro, volas kontroli la evoluon de la aferoj, sed ĝi ne volas fari konkretajn decidojn anstataŭ la kompetentaj ŝtataj instancoj.

La plimulto de la punktoj de la jena Rezolucio estos enkondukitaj ekde la komenco de la jaro 1985. Aliaj punktoj, kies realigo postulas pli longan antaŭpreparadon, estos enkondukitaj dum la sekvaj jaroj.

Ferenc Havasi prezentas la proponon de la Rezolucio al la CK

PREZOJ KAJ SALAJROJ EN HUNGARIO 1950-1982

Jaro	Meza monatsalajro en la ŝtata sektoro (en forintoj)	Indico de la nominala meza salajro	Indico de la preznivelo	Indico de la reala salajro
1950	**683**	**100**	**100**	**100**
1951	729	107	121	89
1952	928	138	169	81
1953	988	145	169	86
1954	1082	162	161	101
1955	**1141**	**167**	**159**	**105**
1956	1235	184	158	117
1957	1442	223	161	138
1958	1478	232	162	144
1959	1540	242	160	151
1960	**1575**	**248**	**161**	**154**
1961	1599	251	162	154
1962	1638	256	163	157
1963	1702	266	162	164
1964	1757	274	163	168
1965	**1766**	**277**	**165**	**168**
1966	1856	288	168	172
1967	1915	300	169	178
1968	1928	307	169	182
1969	2012	325	171	190
1970	**2139**	**345**	**173**	**199**
1971	2239	361	177	204
1972	2342	379	182	208
1973	2512	403	188	214
1974	2682	433	192	226
1975	**2881**	**466**	**199**	**234**
1976	3042	490	209	235
1977	3288	528	217	244
1978	3567	569	227	251
1979	3785	609	247	247
1980	**4014**	**655**	**270**	**243**
1981	4267	693	282	246
1982	**4542**	**731**	**301**	**243**

KONSUMADO DE NUTRAĴOJ EN HUNGARIO POR PERSONO

Jaro	Viando, fiŝoj	Lakto, laktaĵoj	Ovoj	Graso, oleo	Faruno, rizo	Sukero	Terpomoj	Konsumita nutroenergio
	kg/jaro		pecoj/jaro			kg/jaro		kJ/tago
1950	34,9	99,0	85	18,7	142,1	16,3	108,7	11 317
1955	37,6	86,7	102	22,0	151,7	24,4	102,1	12 456
1960	49,1	114,0	160	23,5	136,2	26,6	97,6	12 301
1965	53,2	97,1	188	23,1	139,2	30,1	84,3	12 435
1970	60,4	109,6	247	27,7	128,2	33,5	75,1	12 971
1975	71,2	126,6	274	29,1	122,2	39,4	66,8	13 574
1980	73,8	166,1	317	30,5	115,1	37,9	61,2	13 481
1981	75,3	171,3	314	31,0	113,3	35,5	59,1	13 385
1982	76,0	175,0	315	31,0	112,0	38,0	58,0	13 500

REGIONOJ DE HUNGARIO

Departemento Veszprém

Ĝi situas meze de Transdanubio, kaj unuigas en si mem la plej variajn pejzaĝojn, preferatajn de turistoj. La norda bordo de Balatono kaj la deklivoj de la montaro Bakony (Bakonj), la plej vasta montaro de Transdanubio samtempe proponas multspecajn variaĵojn por tiuj, kiuj serĉas ripozeblon, banlokojn kaj belaĵojn de la arboriĉaj montaroj. La suda parto de la departemento sendube elstaras kiel fremdultrafika specialaĵo de Hungario.

La administra centro *Veszprém* (Vesprem) – havanta 50 000 loĝantojn – estas samtempe la „ĉefurbo" de la montaro Bakony. Ĝi havas pitoreskan situon, kies naturaj donitaĵoj, riĉeco pri artobjektoj ĉiam kreskigas la vizitatecon de la urbo. Dank' al la fervojaj kaj ŝoseaj veturlinioj el ĉiuj direktoj facile atingeblas la urbo.

La historiaj komencoj de la urbo datiĝas en la IV-III. jarcentoj a.K. Speciale riĉaj restaĵoj malkovriĝis el la bronzepoko. Post la patrujokupo (dekunua jarcento) en Veszprém formiĝis la unua episkopa rezidejo hungara. Dum longaj jarcentoj Veszprém estis la kultura kaj administra centro de la ĉirkaŭaĵo. La evoluo de la urbo dum la jarcentoj de la mezepoko forte ligiĝis al la artprotektado de la ekleziaj gvidantoj. Pro militoj kaj incendioj la urbo multe suferis, aldone ankaŭ la pesto en 1709-10 postulis multe da viktimoj.

Post la dua mondmilito Veszprém evoluis en du direktojn: la urbo fariĝis certagrade industria centro, sed fortiĝis ankaŭ ĝia kultura gvidrolo.

El la famaj naskitoj de la urbo menciindas Márk *Rózsavölgyi*, popola muzikisto kaj komponisto, kreinto de la „ĉardaŝ" (popoldanco), kaj Jenő *Cholnoky*, elstara reprezentanto de la hungara geografia scienco.

De 1949 Veszprém estas universitata urbo. Ĉi tie funkcias la Kemiindustria Universitato. Intertempe aldoniĝis diversaj esplorinstitutoj.

En Veszprém fondiĝis la unua provinca zoologia ĝardeno de Hungario, kie en tre bela, natura, arbara ĉirkaŭaĵo vivas la enlandaj kaj ekzotikaj bestoj.

En la proksimo de Veszprém troviĝas la fama porcelan-fabriko de *Herend*. Ĝi estis fondita en 1826. La fabriko – kun 1500 laborantoj – hodiaŭ estas grava uzino de artaj porcelanaj kaj ceramikaj produktaĵoj. Ĝiaj artobjektoj estas konataj kaj ŝatataj en tuta Eŭropo.

Ajka estas juna urbo, kiu ligiĝas parte al la karbminado, krome funkcias en ĝi granda alumin-fabriko. La apartenanta juna uzino de galio reprezentas 10% de la monda produktaĵo de tiu tre valora metalo.

Zirc kun 8000 loĝantoj estas turisma centro de la t.n. Alta-Bakony.

La fortikaĵo en Sümeg

Ĝia ĉirkaŭaĵo abundas je naturaj belaĵoj, kaj pro tio ĝi estas unu el la plej frekventataj turismaj regionoj de Transdanubio. La hungara reĝo, Béla III (1173-1196) ĉi tie fondis kun francaj monaĥoj la cistercianan abatejon. *Bakonybél* en la proksimo de Zirc, ĉirkaŭata de vastaj arbaroj estas tutlande konata ripozejo.

Pápa – kun 28 000 loĝantoj – estas ekonomia kaj kultura centro de la okcidenta Bakony-regiono. La urbo estas grava veturlinia centro. La iama fortikaĵo de la urbo estas unu el la plej gravaj de la reĝa Hungarlando. La reformita kolegio, fondita en 1531, levis la urbon unu el la spiritaj centroj de la tiama Transdanubio. La urbo estas tre riĉa je artmemoraĵoj, al kiuj apartenas la ankaŭ nun konservitaj akvomuelaĵoj.

Kor-formaj tombŝtonoj en la tombejo de Balatonudvari

Rajd-lernejo en Tihany

Malnova akvomuelejo en Tapolca

Nagyvázsony (Nadjvaĵonj) estas ripoz-karaktera vilaĝo inter Balatono kaj Bakony, tamen ĝia ĉefa altirforto estas la mezepoka Kinizsi-fortikaĵo, kaj la tie ĉiujare aranĝataj historiaj rajdistludoj.

Je la komenco de ĉi tiu priskribo ni jam menciis, ke la karakteron de la departemento Veszprém grandmezure difinas la norda bordo de Balatono. El la apud-Balatonaj departementoj (Veszprém, Somogy kaj Zala) ĝuste departemento Veszprém posedas la plej longan bordoparton de Balatono. Sekve kelkaj el la frekventataj banlokoj ankaŭ apartenas al la turismaj centroj de la departemento.

El tiuj banlokoj la plej malnova estas *Balatonfüred.* Kun 12 000 loĝantoj ĝi fariĝis internacie konata sanitara kaj ripozurbo de la ĉirkaŭaĵo. Ĝi havas eksterordinare favoran klimaton, kaj krome abundajn fontojn de kuracakvoj.

Ĉi tie konstruiĝis la unua ŝtonteatro de Hungario. En la parko, ĉe la apudborda promenejo, pluraj el la granduloj de la mondo plantis memorarbon. El ties vico la unua estis Rabindranath Tagore, la mondfama hinda poeto, kiu en la dudekaj jaroj pasigis monatojn en Balatonfüred, por kuracigi sian kormalsanon, kaj je la gojo de sia resaniĝo li plantis la memorarbon.

Tapolca estas konsiderinda turisma urbo de la ĉirkaŭaĵo, estiĝinta sur la vulkandevena bazaltmonto. Ĝia plej ofte menciata vidindaĵo estas la Lagagroto, kies termoakvon oni uzas por kuracado de reŭmatismaj malsanuloj.

Keszthely (Kesthej) havas 21 000 loĝantojn. Ĉi tie oni fondis la unuan agrikulturan altlernejon de Hungario, el kiu evoluis la nuntempa Agrikultura Universitato. La iama kastelo de la grafa familio Festetich nuntempe ofte rolas, kiel scenejo de altnivelaj internaciaj koncertoj.

En la departemento funkcias pluraj Esperanto-grupoj, inter ili en Veszprém, Tapolca, Ajka, Várpalota.

La lernantoj de la Internacia Lingvo rekrutiĝas precipe el inter la lernejanoj.

El la internaciaj E-aranĝaĵoj elstaras la lasta IFEF-kongreso, kiun oni aranĝis grandsukcese en majo de 1982, en Balatonfüred. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 600 fervojistaj esperantistoj.

István *Lászlô*

Balatono – la hungara maro (Foto de Z. Fejer)

Prof. Kees Versteegh estas unu el tiuj nemultaj lingvistoj, kiuj rigardas Esperanton studinda pro ĝenerala-lingvistikaj kialoj. Pri ĉiuj liaj konstatoj, por multaj eble herezaj, oni ne povas konsenti, sed tre gravas la fakto, ke li lanĉas novajn pensojn, ideojn pri la traktado, studado kaj aliro de Esperanto; kiel ekstera, neŭtrala, objektivema observanto, li donas al ni, esperantistoj, motivojn pense kaj mense revui, eventuale revizii iujn niajn cementiĝintajn, eble rustiĝintajn konceptojn, ja ni havas malofte okazon rigardi en fremdan spegulon.

La tradukinto

Kees Versteegh
(Universitato de Nijmegen)

Piĝiniĝado, kreoliĝado kaj Esperanto

Inter la 7a kaj 12a de aŭgusto 1983 estis okazigita la 5a Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj en Sümeg (Hungario), kadre de kiu interalie estis pridiskutitaj diversaj aspektoj de Esperanto. Unue mi volus ĉi-loke klarigi, kial mi, lingvisto kaj orientalisto, decidis akcepti la inviton prelegi dum la renkontiĝo. Por mi – kaj certe ankaŭ por la plimulto de la lingvistoj – Esperanto ĉiam estis iel fenomeno eksterlingvistika: artefarita, nenatura lingvo, kiu apenaŭ povis havi intereson por lingvisto. Sed kiam antaŭ tri jaroj mi komencis interesiĝi pri piĝinaj kaj kreolaj lingvoj, kaj apliki la rezultojn de la studado de ĉi tiuj lingvoj sur mia tereno – la historio de la araba lingvo –, ekestis en mi la demando, ĉu ankaŭ ekster la tereno de la piĝinaj kaj kreolaj lingvoj, en strikta senco, demonstreblas similaj eksterordinaraj procezoj de lingvoalproprigo. Do tute nature leviĝis la demando, ĉu ekzistas homoj, eble por kiuj Esperanto estas gepatra lingvo. Dank' al la afabla helpo de kelkaj esperantistoj mi povis kolekti materialon priteman. En ĉi mia laborajo nun mi provas diskonigi la ricevitajn rezultojn en simpla formo.

En sia laborajo Ernő Csiszár okupiĝas pri la procezo de lingvoalproprigo, kaj li diferencigas inter primitiva lingvoalproprigo de infanoj, kaj tiu lerneja de plenkreskuloj. Sed ekzistas ankaŭ tria maniero de lingvoellerno, kiu en Eŭropo estas sufiĉe rara, sed en la cetera mondo tre ofte estas praktikata. Ni imagu situacion, en kiu sufiĉe granda grupo de plenkreskuloj estas devigita ellerni fremdan lingvon dum mallonga tempo sen ia ajn helpo, t.e. sen instruistoj, lernejo kaj lernolibroj. En tia situacio la ununura eblo por la parolontoj estas plejeble simpligi la sistemon de la lingvo, sisteme transstrukturi ĝin. En ĉi tiu procezo la sistemo pliparte perdas sian redundancon kaj eĉ: povas malaperi ĉiuj esceptoj. Tia procezo de lingvomodifiĝo okazis ĉiam tie, kie homoj devis adapti sin al nova situacio tiamaniere, ke ili provis ellerni la lingvon de alia popolo. Tio validas unuavice pri la ellerno de la grandaj koloniaj lingvoj en la epoko de la koloniado de Afriko kaj Azio, precipe en la kadroj de sklavokomerco. Sed la sama procezo observeblas nuntempe ĉe la tiel nomataj gastlaboristoj en la landoj de Okcidenta Eŭropo, kiuj sen instruado devas provi paroli germane, nederlande, aŭ france, kaj uzi ian simpligitan varianton de tiuj ĉi lingvoj. Ĉi tiu procezo nomiĝas piĝiniĝado. Kiel historiaj rezultoj de tiu ĉi procezo troviĝas ĉie en la mondo piĝinaj lingvoj kun milionoj da parolantoj. Ekzemple la piĝinigita angla en Tok Pisin (Nov-Gvineo), por mencii nur unu ekzemplon. Ĉi-sube ni vidos, ke la piĝinigitaj lingvoj ofte pluevoluas. Do mi konsideras piĝinigita tian lingvon, kiu dum mallonga tempo radike ŝanĝiĝis kaŭze de lingvoalpropriga procezo ĉe granda grupo da novaj parolantoj. Tian lingvon oni ja povas konsideri natura lingvo laŭ la kompreno de la moderna lingvistiko, sed aliparte ĝi estas esence malpli taŭga por la komunikado ol aliaj lingvoj, kiuj ne subiĝis al la sama procezo. Kaj ĉar la piĝinigita lingvo estas uzata ĉiam nur en difinitaj komunikadaj kadroj, ĝi taŭgas nur por limigitaj celoj, ĝia vortaro estas same tre malvasta. Kun tio koneksas, ke la piĝinigita varianto estas uzata plejofte nur por kelka tempo, nome: dum kontaktoj ekzistas inter la lingvodiversaj grupoj. Sed en kelkaj kazoj, precipe se la koncerna socio estas multlingva kaj sekve la piĝinigita varianto estas la ununura interkomunikilo, ĝi konserviĝas kaj eĉ en ia senco normiĝas kaj plivastiĝas la lingva materialo, laŭ la bezonoj de la socio. Tamen la piĝinigita lingvo restas helpa lingvo, uzata nur en nepra bezono.

Ĉi tiu situacio komencas ŝanĝiĝi, kiam en la koncerna socio sufiĉe granda nombro da miksaj geedziĝoj okazas, en kiuj la diverslingvaj gepatroj povas interkomuniki kun siaj gefiloj nur en la piĝinigita varianto. Kaze de tia disvolvo la alproprigo de la gepatra lingvo far la infanoj devas eliri logike el la helplingvo. Ĉi tiu procezo, en kiu nova lingvo konstruiĝas, estas nomata ĝenerale kreoliĝado.

Kiel ekzemplojn ni povus citi la kreoligitajn variantojn de la angla: la jamaikan, la krio'on (Siera-Leono), la sranan'on (Surinamo); de la franca: la haitian kaj de la hispana: la papjamenton (Curaçao).

Ni devas ĉi tie eksplicite emfazi, ke la tiel estiĝinta lingvo estas kompleta, tute finkonstruita lingvo. Por ating tiun ĉi rezulton, la infanoj devas apliki certajn strategiojn. Dum kaze de piĝiniĝado la unua bezono de la novaj parolantoj estas plifaciligi la ellernadon, ĉe kreoliĝado aperas precipe la strebado disvastigi la lingvan materialon, por ke la lingvaj rimedoj sufiĉu por ĉiuj ebenoj de la komunikado. Alivorte: ĉe piĝiniĝado malaperas la redundanco, esceptoj, malhaveblaj kategorioj, dum ĉe kreoliĝado kreiĝas novaj kategorioj kaj reguloj, kaj estiĝas nova varieco kaj redundanco.

Per la ekzemplo de la piĝina lingvo tok-pisin'a mi provas klarigi tiun ĉi procezon. En tiu ĉi lingvo estas nur unu verboformo, ekz. *mi hitim* „mi batas, batis, batos". Por esprimi la tempajn rilatojn, oni povas eventuale uzi certajn tempajn adverbojn, ekz. *pinis* (angla *to finish* „fini") por la pasinto, aŭ *baimbai* (angla *by-and-by* „iom post iom") por la futuro. Origine estis verŝajne pli da tiaj helpaj adverboj, sed poste la elekteblo limiĝis je du. Tio klarigeblas per tio, ke la tok-pisin'a kun la paso de la tempo en certa grado normiĝis: tiel la lingvo estas uzata en la sendependa parto de Nov-Gvineo kiel oficiala lingvo. En la proksima pasinto komenciĝis nova disvolvo, kiu koneksas kun tio, ke ekzistas certa kreskadanta nombro da parolantoj, por kiuj la tok-pisin'a estas gepatra lingvo, nome por tiuj infanoj, kiuj naskiĝis el miksa geedzeco. En la kreoligita varianto de la tok-pisin'a – kiun ĉi tiuj infanoj parolas – uzatas kiel ordinara gramatika paradigmo: *mi hitim pinis* „mi batis", *mi bai hitim* „mi batos". Ĉi tie ni tute klare vidas, kiel la origine simpligita varianto de la angla ricevas novajn gramatikajn diferencojn, kaj kiel transinrerpretiĝas gramatike la leksikaj rimedoj de la piĝina lingvo en la kreoligita varianto. En la procezo de la kreoliĝado la lernmodelo ne ĉiam devas esti iu piĝinigita lingvo: ankaŭ artefarita lingvo povas servi en certa kazo kiel modelo. Klasika ekzemplo por tia disvolvo estas la revivigo de la klasika hebrea lingvo en Israelo. Kvankam ĉi-kaze, pro ideologiaj-religiaj konsideroj, la tendenco al purismo estis tre forta, la nova lingvo estis ŝanĝata de la junularo tiamaniere, ke unuflanke la strukturo certagrade simpliĝis, aliflanke kaj precipe formiĝadis nova varianto: disvolviĝis novaj informaciaj registroj de la lingvo, specialaj lingvaĵoj, slango, blasfemoj, sume: ĉio, kio apartenas al vivanta lingvo. El ĉi tiu ekzemplo evidentas, ke ordinara lingvo ne povas malhavi certan redundancon kaj variecon. En ĉi tiu rilato ne tre gravas, ĉu oni nomas ĉi tiun disvastigadon de lingvaj-stilistikaj rimedoj kreoliĝado, aŭ oni elektas por ĝi propran terminon.

Kaj se nun ni returniĝas al Esperanto, ni devas konstati, ke fakte pluraj strukturaj koincidoj estas inter ĉi tiu artefarita lingvo kaj la simpligitaj, piĝinigitaj variantoj de aliaj lingvoj. La vortospecoj estas flekseblaj, preskaŭ tute mankas infleksio, kunmetitaj vortoj servas por esprimo de kompleksaj semantikaj nocioj – kp. ekz. la semantikan opozicion, esprimitan per „mal-" –, ne ekzistas esceptoj. Aliparte Esperanto diferencas de piĝinigitaj lingvoj per sia vasta formologia derivado, kompleksa sistemo de adverboj, riĉeco je prepozicioj kaj precipe per la fakto, ke en Esperanto estas certagrada redundanco en la morfosintakso (akuzativo, verbotempoj, adjektivaj kaj substantivaj finaĵoj, participoj). En multaj aspektoj Esperanto similas plie al kreola lingvo.

Se nun la teorion de piĝiniĝado kaj kreoliĝado ni aplikas al la disvolvo kaj alproprigo de Esperanto, lanĉiĝas du demandoj. La unua demando estas, ĉu eblas, ke en kelkaj kazoj la ellerno de la nova lingvo ĉe kelkaj studantoj restas neperfekta. Se oni devas ellerni lingvon rapide kaj sen sufiĉa instrukciado, oni emas simpligi la strukturon de la lingvo por la plifaciligo de la lernado. Esperanto estas ellernata ĝenerale lernejmetode; en kelkaj kazoj tamen povas okazi, ke plenkreskuloj devas alproprigi la lingvon je propra fisko kaj risko, kaj dume tiuj elementoj de Esperanto, kiuj estas konsiderataj redundancaj, ellasiĝas: ĉi tie oni povas pensi unuavice pri la uzado de akuzativo. Kaj vere: en la raportoj pri la ellerno de Esperanto, precipe en tiuj de homoj, klopodantaj eduki siajn gefilojn en Esperanto, ripetiĝas la plendo, ke ili mem ne sufiĉe intimas kun la lingvo, por entrepreni tian aferon. Tio signifas, ke ĉi tiuj homoj devas paroli kun siaj infanoj neperfektan varianton de la lingvo. Kompreneble, grava faktoro estas ĉi tie la vortaro, ĉar ĉe intensa uzado de la lingvo oni estas devigata mem eltrovi novajn vortojn. Kompreneble, la strukturo de Esperanto ĉi-rilate jam difinas per si mem la direkton de la vortformado.

Sed pli gravas la dua demando: kio okazas al la lingvo de la infanoj, kiuj lernas Esperanton kiel gepatran lingvon? La ekzistantaj spertoj pri ĉi tiu fenomeno helpas nin nur parte, ĉar ĉi tie temas pri esceptaj kazoj, sen multa interkomunikado inter la infanoj. Tial prefere oni formulu, kio okazus, se – tute teorie konsiderante –, estus granda nombro da denaskaj esperantistoj? Por responti la demandon, oni devus konsideri antaŭ ĉio la spertojn pri la citita ekzemplo de la ivrita lingvo. Ĉi tiuj spertoj kondukas nin al tute ĝenerala antaŭdiro, nome, ke en tia situacio la lingva strukturo transiras al memstara ŝanĝiĝado. Ĉe amasa ellernado de Esperanto ne plu eblos – kiel ĝis nun – validigi purismajn tendencojn, kaj oni devos kalkuli kun tio, ke infanoj laŭ siaj bezonoj ŝtopos la malplenojn en la lingvo, kiun ili lernis de la gepatroj. La limigita lingva fonto – temu ĉu pri piĝina, ĉu artefarita, kreita lingvo – jam tute ne kapablos kontentigi ĉiujn postulojn, starigitajn de la novaj gepatralingvuloj.

Ne nur la gramatika strukturo de la lingvo, kodigita en la manlibroj por esperantistoj, estos minacata de tia procezo, sed ankaŭ la unuformeco. La socilingvistika situacio kontribuos al la kresko de la lingvovarieco, kaj kio nun validas kiel plej granda avantaĝo de Esperanto – la unueco de la lingvo por ĉiuj kaj manko de diferencoj

inter ĝiaj parolantoj – estos kompreneble endangerigita aŭ eĉ malaperinta. Sed pli bone estas ĉi-rilate ne lasi nin gvidi per iluzioj: se oni strebas fari Esperanton lingvo de tuta socio, oni ne povas atendi, ke ĉi tiu socio povos liberigi sin de la ordinaraj leĝoj de la lingva komunikado, validaj por ĉiu socio. La ekzemplo de la ivrita lingvo montras, ke la novaj parolantoj, komencinte komunikadi inter si – t.e. ekster la ŝirmanta medio de la familia vivo – kreas al si novajn varieblojn. Ili bezonas – kiel ĉiu homo, parolanta sian gepatran lingvon – siajn proprajn registrojn, iun subnormon, specialajn lingvaĵojn, por diferencigi sin de aliaj grupoj de parolantoj. Por diri nur unu ekzemplon: se Esperanto ne ofertas blasfemajn vortojn, la infanoj baldaŭ komencos – kiel la infanoj en Israelo – prunti tiajn el la najbaraj lingvoj.

Tio kondukas min al tute ĝenerala rimarko, kiu nur pretere koneksas kun la piĝiniĝado kaj kreoliĝado. Kelkfoje oni havas la impreson, ke la Internacia Lingvo por esperantistoj estas la rimedo por edukado de nova homtipo aŭ konstruo de nova socio. Ĉi tiun impreson firmigas la raportoj pri denaskaj esperantistoj: ĉi tiuj infanoj – laŭ la menciitaj raportoj – ne uzas blasfemajn vortojn kaj ili ne kverelas, simple pro tio, ke ne ekzistas vortoj por tio en Esperanto. Aliflanke oni rilatigas la lingvan konduton al la socia konduto, kiam oni asertas, ke ĉi tiuj infanoj neniam zorgas pro politikaj, sociaj, etnaj aŭ religiaj diferencoj, ĝuste pro tio, ke la esperantista edukado ne ofertas por tio lingvan esprimeblon. Evidente oni havas la opinion, ke ankaŭ ĉe amasa alproprigo de Esperanto ĉi tiuj idealoj povos esti gardataj, konservataj, kaj tiel oni fakte povos konstrui socion, en kiu ankaŭ praktike ne estus subpremo aŭ diskriminacio.

Nun ni jam parolas ne pri la sociolingvistika disvolvo de lingvo, sed pri la eblo krei novan homon. Finfine restas la demando de kredo, ĉu oni akceptas aŭ ne la disvolvon de novaj registroj kaj nova varieco en la lingvo, skizitan de mi supre. Kvankam rilate al la eblo, ŝanĝi la homon, mi inklinas al skeptikismo, mi volus aliparte emfaze konstati, ke mi estis tre favore impresita de la natura aplikado de Esperanto kaj entuziasmo de ĉiuj parolantoj, sed ĉefe de la denaskaj esperantistoj, sekve de miaj observoj, faritaj en Sümeg. Kiel lingvoscienculo mi povas aldoni, ke oni povas nur bedaŭri, ke ĝis nun la oficiala lingvistiko ne dediĉis sin al la studado de tiuj ĉi fenomenoj, nek diris sian opinion pri la signifo de la disvolvo de Esperanto por ĝenerala-lingvistikaj problemoj.

Mi volus danki sinjoron Ernő Csiszár (Várpalota) pro la afabla invito al la Renkontiĝo kaj por la materialoj kiujn li al mi disponigis. Sinjoro d-ro Walter Hube (Internacia Esperanto-Muzeo, Vieno) helpis al mi ricevi laboraĵojn el „Gepatra Bulteno".

Kiel enkondukon en la studadon de piĝinaj kaj kreolaj lingvoj proponatas legi: Loreto Todd, *Pidgins and Creoles* (London: Routledge and Kegan Paul, 1974.). Pri la dulingva edukado per Esperanto mi konsultis: Ernő Csiszár, *Observoj pri infanaĝa dulingveco* (manuskripto) kaj Christian R.A. Declerck, „Lingva evoluo ĉe denaska dulingvulo" (En: *Gepatra Bulteno* 11/12 / 1969 / 4-16). Pluajn raportojn pri konkretaj kazoj oni trovas en *Gepatra Bulteno* 1 /1967 / 3-6; 2 / 1967 / 26-28; 6 / 1968/ 5-8; 6 / 1968 / aldono. Nun aperintan publikaĵon pri la Esperanto-movado far Peter G. Forster, *The Esperanto Movement* (The Hague: Mouton, 1982.).

El la germana tradukis: József *Kiss-Horváth*

La partoprenantoj de la 5a Renkontiĝo de Esperantistaj familioj en la fortikaĵo de Sumeg (Foto de E. Csiszár)

HUNGARIO ATENDAS LA GEJUNULOJN!

LA JUNULARA KAJ STUDENTA VOJAĜOFICEJO EXPRESS OFERTAS SIAJN VASTAJN SERVOJN POR AKCEPTI GEJUNULOJN

EXPRESS loĝigas grupojn kaj individuajn turistojn en siaj propraj hoteloj, internaciaj ripozcentroj, studentaj hoteloj ktp.

EXPRESS organizas turismajn kaj studprogramojn, feriadon, sportprogramojn

EXPRESS organizas por grupoj kun speciala interesiĝo amikajn kunvenojn kun hungaraj gejunuloj, vizitojn al kulturaj, ekonomiaj institucioj, diversgradaj lernejoj, junularaj kluboj.

Variaj programoj, enhavriĉa restado – ĉio ĉi je prezoj moderaj ankaŭ por gejunuloj!

Junulara kaj Studenta Vojaĝoficejo EXPRESS

1395 Budapest
Szabadság tér 16.
Telefono: 317-777
Telekso: 22-53-84
Telegramadreso: Tourex Budapest

Károly Szakonyi
(1931–)

Ili parolas pri la kvara

– Ĉe la enterigo, kompreneble, ili ĉiuj havis survizaĝe la grandan funebron – diris la maljunulino. – Ili ĉiuj. Fajna familio! Antono ploris, tute ŝvelaj estis liaj okuloj, Toĉjo, la pli granda filo, lin apogadis.

– Do tamen: li ŝin amis – balancadis la kapon la alia virino.

– Ĉu li ŝin amis? Nur tion ne diru, kara mia.

Ili silentis. La maljunulino mendis ĉokoladan torton, metadis etajn pecojn en la buŝon, la ĉokolado fandiĝis sur la pinto de ŝia lango, ŝi ĝin gustumadis. La alia virino elrigardis al la placo. Pluvis, plenplenaj tramoj alkuris la haltejon. En la kafejeto estis silento post la grandaj vitrofenestroj.

– Tion, tamen, neniu povas scii, kiom Antono amis la povran Ellan.

La fingroj de la maljunulino estis glumalpuraj pro la torto. – Nu, mi scias ja, kiom. En la tridekaj jaroj... kaj ankaŭ poste ĝis nun... ni estis la plej bonaj amikinoj. Ja mi scias tion.

– Rigardu – diris la alia virino –, Beata venas.

Tra la placo, en koto kaj flakoj, la tria virino paŝetadis. Irizkoloran pluvombrelon ŝi tenis super sia kapo. Sed, ĝis sub tegmenton ŝi venis, tamen unu ŝia flanko malsekiĝis, ŝiaj ŝtrumpoj tute kotiĝis.

– Feliĉe, ke mi kunportis ombrelon – ŝi diris anstataŭ saluto. – Kvankam mi ne volis, oni devas ĝin meti en la vestejon, kaj ankaŭ tio kostas unu forinton. – Ŝi demetis sian ĉapelon, per ŝiaj kurbetiĝintaj fingroj ŝi ordigis sian har-nodon. – Nu, jen do! Hieraŭ, kiam vi telefonis, Alica kara, mi vere apenaŭ povis kredi, ke la povra Ella! – ŝi alrigardis la pli junan virinon kaj ekpremis ŝian brakon. – Mi diris, ĉu ne, mia kara, en la telefono, ke mi ne povas eliri al la enterigo? Nuntempe, se mi longe staras en la sama loko, terure ekdoloras al mi la piedoj. Kaj ankaŭ cetere. Mi pensas, ke tio ne estus utilinta mian nervo-staton. Mia Dio! Do finiĝis ŝia suferado? Pli bone al ŝi.

– Mi estis tie – diris la maljunulino.

– Kompreneble, vi, ĉu ne, mia Ilma, vi devis tie ĉeesti. La plej bona amikino. Ja ankaŭ mi... ja ankaŭ mi mem... Diru, ĉu la ĉokolada torto estas bona, aŭ mi mangu prefere rizfruktafon?

La kelnerino staris apud ili. – Ĉu mi povas alporti rizfruktafon?

– Ve, filineto, atendu iomete. Tiu eble tro grasigas. Ĉu multa kremo estas sur ĝi?

La kelnerino kapbalancis. Ne malmulte da kremo.

– Do alportu tranĉafon de punĉtorto. Kaj nigran kafon, simplan, sed oni ĝin ne vaporumu.

– Mi estis tie – diris la maljunulino –. Ĝuste mi rakontas tion al Alica. Antono, la edzo de Ella, ploris, Toĉjo lin apogadis, kaj tiu alia bubaĉo, tiel mi devas lin nomi, tiu estis kun tiu virino... nu, kiel diri, vi scias ja, kun kiu li vivas kune. Vere, belega societo. Funebro, plorado, kvazaŭ tiomege ili estus ŝin amintaj. Kvazaŭ eĉ por unu tago ili estus elmeritintaj por si Ellan. Al la malpli granda knabo, al tiu Beĉjo, mankis la mono eĉ por nigra vesto. Striita sportvesto! Ĉe la enterigo de lia patrino!

– Tio estas terurafo! – indignis Beata.

– Kvankam, kiom ŝi suferis pro ili! Kiom ŝi oferis por ili! Ĉu ili meritis tion? Jen estas jam Antono mem. Jam tie ĝi komenciĝis, ĉu ne, ke Antono estis absurda ulo.

– Se mi bone scias, Antono estis profesoro – diris Alica.

– Ĉu profesoro? – ekridis Beata. – Nu, tion vi vere bone scias, Ilma.

– Figon, ke li estis profesoro – gestis la maljunulino. Ŝi viŝadis siajn fingrojn per papera buŝtuko, la buŝtuko okaze falis surteren, ŝi puŝis ĝin plu perpiede. – Agento li estis. Sed tute malfeliĉa pita agento ĉe Zwack. Poste li volis fari ian negocon antaŭ la milito, sed oni lin trompis, post la milito li dungiĝis kiel oficisto, poste laboris en fabriko, kaj fine, tute neatendite, li promociis sin profesoro! – La maljunulino klukketis ride. – Lingvoprofesoro! Ĉar, tial ke li naskiĝis en Burgenland, li sciis iom germane kaj kroate. Por tridek forintoj li donis horon de leciono. Ĉar labori, bonorde, li neniam volis. Sed la filoj fariĝis ja ĝuste tiaj, senescepte. Ili ambaŭ.

– Kaj mi opiniis, ke li estas gimnazia profesoro – miris Alica. – Tute tiaj estis liaj manieroj.

– Manieroj? ! – Beata manĝis la punĉtorton. – Oj, vidu, akvon ne alportis tiu knabino. Estas terure, se oni ne petas la akvon aparte, oni ĝin forgesas. Ankaŭ tiu ĉi punĉtorto estas ne tre freŝa... Jes, jes. Mi neniam komprenis, kial la povra Ella estas tiom korligita al tiu Antono.

– Ŝi enfreneziĝis al li – diris la maljunulino. – Kiam foje, siatempe, en tridek du, tiu ĉi Antono akompanis la povran Ellan en la naĝejon, mi diris jam tiam: Aŭdu, filnjo, ĉi tiu viro estas ventobatanto. Se vi estus vidinta, kiom ŝi prenis tion sur la koron. Nu, mia Dio, tiam mi ankoraŭ ne sciis, ke la afero estas serioza! Mi opiniis, ke temas pri eta flirto, vi scias, vi memoras, Beata, kiel ni sciis aranĝi tiujn etajn flirtojn. Ankaŭ Ella. – Ŝi turnis sin al Alica. – Vi tiam ankoraŭ ne konis ŝin. Admirinde bela knabino ŝi estis. Svelta. Knabeska vizaĝo, kurtaj haroj. Ŝiaj kruroj estis la plej belaj. Kaj la grandaj bluaj okuloj!

– Ŝiaj okuloj – diris Alica – estis tre belaj ankaŭ poste, kiam mi ŝin ekkonis.

– Ho, tio jam ne estis la vera beleco, ĉu ne, Beata?

– En kvin aŭ dek jaroj ŝi ruiniĝis. Naskiĝis de ŝi la filoj, unu filineto mortis, Antono nenion perlaboris.

– Sed tion mi vere ne povas kompreni! Eĉ nun mi ne povas kompreni, post tiom da jaroj, kion do ŝi atendis de tiu Antono? La plej bonajn partiojn ŝi estus povinta fari. La viroj pro ŝi frenezumis.

– Kion ŝi atendis de li? – demandis Alica. Ŝi rigardis tra la fenestro eksteren en la pluvon. Tristaj estis la placo, la urbo.

– Al mi ŝi diris ĉiam, kiam mi ŝin demandis pri tio, ke ŝi lin amas. Ŝi lin amas, kaj punkto. – Beata parolis per plena buŝo. – Nu jen, nun mi trinkus gluton da akvo, kaj akvo mankas. – Ŝi mansignis al la kelnerino. – Alportu, mi petas, glason da sodakvo. Ĉi estu tepida, ĉu jes?

– Do, ŝi lin amis – kapbalancis Alica.

– Nu bone, ŝi lin amis – diris la maljunulino. – En la unuaj tempoj, kompreneble! Tamen, ankaŭ poste, kaj jen kio estas stranga. Kvankam Antono jam drinkis. Liaj aferoj iris mise, li estis maltrafulo, drinkis; homoj malfeliĉaj drinkas, ĉiuj. Kaj Ella lin ĉiam ankoraŭ amis. Jen kio estas kurioza. Tia grandioza virino kiel Ella!

– Foje mi vizitis ilin – rakontis Bella –, tiam ili loĝis en la avenuo Fiume. Kaj jen, ŝi lavis tolafojn! En la kuirejo ŝi lavis, ĉio estis nura vaporo tie. Mia bona Dio, mi diris, kial do vi ne laborigas lavistinon? Kompreneble, mi sciis, ke eĉ tiom ŝi ne povas al si permesi. Sed la filojn ŝi instruigis en gimnazio, ŝi batalis por tio, por ke ili lernu, ilia patro estus ilin sendinta, ke ili estu metilernantoj aŭ mi ne bone scias, se nur monon ili portos hejmen. Sed ne, Ella postulis, ke ili faru la matur-ekzamenon. Nu, karulinjo, mi diris al ŝi, nemalgranda azeno vi estas. Por tio estis do bezonata la komerclerneja diplomo? Por tio estis bezonata la ludo de fortepiano? Tiu granda elektado inter la knaboj en la danclernejo? – Beata suspiris, unun el la sukerkubetoj ŝi faligis en sian kafon kaj malrapide ĝin kirlis. – Dum la tuta vivo, ŝi poste laboris por tiuj tri viroj. Mi, se paroli sincere, estis devigita ŝiri kun ŝi la interrilaton por kelka tempo. Mia edzo, ĉu ne... Sed ni ne povis ilin viziti, nek ilin al ni inviti. Povra, bona Ella!

– Antaŭ unu jaro, aŭtune, kiam Beĉjo havis sian ekspozicion en Arta Salono, mi konversis kun Ella – diris Alica. – Mi opinias, ke ŝi estis feliĉa. – La aliaj du oldulinoj surprizite suprenrigardis. Alica mallaŭte daŭrigis. – Ŝi diris al mi: „Jen, vidu, mia filo! " Tiel ŝi iradis inter la statuoj kiel en la preĝejo. Por mi ĉi tiuj statuoj estas iom strangaj, ŝi klarigis, sed Beĉjo min jam instruadas, kion mi vidu en ili. – Alica iom silentis. – Jes, ja Ella diris: „Jen, vidu, mia filo! "

La aliaj du virinoj silentis.

– Nu, tiutempe ankaŭ mi parolis kun Ella – flankentiris la maljunulino ŝian buŝon. – Mi demandis ŝin: Ĉu fine ĉi tiu Beĉjo vin helpas jam? Ho, ŝi diras, ho, li ankoraŭ ne atingis tien, ĉu ne? Kaj Toĉjo? Tiu jam atingis tien, ĉu ne? Ho, Toĉjo kun sia edzino konstruigas societan loĝejon, ŝi diris, ili tre bezonas la monon. Nu! Kaj la maniero, kiel ŝi tion diris! Por ŝi ne estis egale. Do, kompreneble ŝi ne plendis, precipe al mi neniam ŝi plendis. Mi diris al ŝi jam en la unua momento: Ella, vi ruinigos vian vivon. Nè rigardu tion, ke vin frenezigis la kurtaj nigraj lipharoj kaj la brunaj okuloj de Antono. Tion rigardu, ĉu li povos vin vivteni? Mi estis, ĉu ne, kapitanedzino, la edzo de Beata estis sekciestro en la ministerio de kulto... Iom malagrable tuŝis Ellan, ĉu ne, ke ŝi restis malantaŭe el la trijungaĵo. – La maljunulino klarigadis nun al Alica: – Kiel do ŝi rericevis tion, kion ŝi donis? Sian inteligentecon, sian bonanimecon, sian memoferon?... Al neniu ŝi diris, sed ĉiu sciis, ke Antono havis interrilaton ankaŭ kun aliaj virinoj.

– Tiu Beĉjo tute similiĝis al li – rimarkis Beata.

– Ha, Beĉjo! – gestis la maljunulino malestime.

– *Mi opinias, ke vi vidis tiun virinon, kun kiu li kunvivas jam de kvar jaroj,* nur tiele. *Nu, preskaŭ mi eldiris, kiaspeca ŝi aspektas.*

– *Sed tamen devis ekzisti io, pro kio ŝi surprenis ĉion ĉi? – meditis Alica.*

– *Kion ŝi estus farinta, karulinjo? – demandis Beata. – Ĉu forlasi sian familion?*

– *Ankaŭ nun, en la lastaj jaroj, ŝi ankoraŭ laboris. Sveterojn ŝi kunkudris. Ŝi hejmenportis la materialon el kooperativo kaj hejme ŝi ilin kunmetis. Nur por ke ŝi povu ion ŝovi en la manon de siaj filoj.*

Nu, ja mi diris al mia filo, Alekso, kiam li parolis al mi pri la nova modo, ke mi iru al ili por gardi pri la infanoj, ĉar ili volas iri en la teatron: Mi diris aperte: jen tie la taksi-vartistino, unu telefona voko estas la tuto. – Beata alrigardis Alican. – Vi ne konas ĉi tion, karulinjo, soleca virino ne konas ĉi tion, ĉu ne, nek infano, nek nepo... Sed oni ne devas lasi, ke oni nin senviscerigu. Kie estas la danko? Kie la rekompenco? La povran Ellan ili senviscerigis, ekspluatis, ŝia vivo estis turmenta klopodado, kaj nun, vidu, kio do! Ĉu tio estas inda je la peno? Tie ŝi nun estas, en la tombejo.

– Se vi estus tion vidinta – diris la maljunulino –, la okuloj de Antono estis ruĝaj *de ploro. Kompreneble, povas esti, ke* ree li drinkis. *Ankaŭ de drinko ili povis esti ŝvelaj. Sur Beĉjo estis la sportkostumo... Kaj kion ŝi ricevis de ili, dum ŝi vivis, la kompatinda? Kion? Tie ili staris, en funebro, sed kion dum sia vivo ŝi ricevis de ili?*

Beata sorbadis sian kafon. – En ĉi tiu kafejo neniam oni donas kafon bonorde rostitan. Vane oni metas proteston.

– Kaj se tamen ŝi estis feliĉa? – meditis Alica. Ŝi rigardis eksteren en la pluvon. – Kiu scias, kio do al ŝi estis bona? Eble ŝi amis ilin.

Tradukis: K. Kalocsay

Gyula Juhász
(1883-1937)

Ĉu amo?

Ne scias nun mi, kial, sed tre-bone
pri via vorto revi lule-drone,
kiel pri nub' krepuska, kiu brilas,
kaj trans ĝi steloj feble ekjubilas.

Ne scias nun mi, kial, sed tre dolĉe
estas, se vi rigardas al mi sorĉe,
kiel nur sunradio la tegmenton,
antaŭ ol laste celi okcidenton.

Ne scias nun mi, kial, sed mi sentas
ke ree bel' en mia viv' kresĉendas.
Velure via vorto kovras ombrojn,
kiel karesas marta vent' la tombojn.

Ne scias nun mi, kial, sed tre bona
estas ĉi sent' dolora, dolĉ-aroma.
Ĉu estas ĝi eraro, stulta vano?
Pardonu min, se estas ĝi la amo!

El la hungara: Vilmos *Benczik*

Péter Bornemissza
(1535–1584)

Estas ploropreme...

Estas ploropreme nun disiĝi devi,
Hungarland' benata nun foriri de vi.
Ĉu iam loĝos mi en bona Buda-urbo?

En montar' orgojle regas la germanoj,
ebenaĵon regas turkaj fipaganoj.
Ĉu iam loĝos mi en bona Buda-urbo?

Min orgojle pelas ĉie la germanoj,
ĉie min ĉirkaŭas turkaj fipaganoj.
Ĉu iam loĝos mi en bona Buda-urbo?

Hungarlandaj mastroj aĉe min insidis,
eĉ la veran dion ili jam perfidis.
Ĉu iam loĝos mi en bona Buda-urbo?

Hungarland' benata, gardu vin la dio,
ĉar prosperi ĉesis en vi ĉiu pio.
Ĉu iam loĝos mi en bona Buda-urbo?

Ĉion ĉi en burgo Huszt en fora foro
Péter Bornemissza verkis por konsolo.
Ĉu iam loĝos mi en bona Buda-urbo?

Tradukis: Imre Szabó

Ĉu IRET aŭ SAESTR?

Teatra raporto el Zielona Góra

Modestan kaj simpatian multobligitan cirkuleron enmanigis poŝtistoj dise en Eŭropo komence de la jaro: invitilon al Studenta Amatora Esperanta Teatra Renkontiĝo, aranĝota far Pola Studenta Esperanto Komitato de 12-a ĝis 15-a de aprilo. Kaj venis la antaŭpaska semajno, venis la unua tago – por surprizo.

Entuziasmo ne sufiĉas

La Internacia Lingvo Esperanto en Pollando havas tradiciojn, kaj ĝi estas disvastiĝinta ankaŭ en studentaj rondoj, precipe en la pli grandaj universitataj urboj, kiel Varsovio, Kraków, Poznan, Torun. Nun studentoj – entuziasmaj freŝbakitaj esperantistoj – el Zielona Góra akceptis la taskon organizi internacian teatran renkontiĝon. Fakte la ĉijara aranĝaĵserio estis jam la dua – laŭ la kalkulo de la organizantoj – ĉar pasintjare ili faris jam la samon: kunvenigante diversajn studentajn teatrajn trupojn el Pollando.

Mike Sadler kiel kanzonisto



Sed kiam kaj kiel estis trabaptata SAESTR al IRET? Certe neniu el la organizantoj rimarkis, ke tiu nomo jam estas okupita marki renkontiĝon de profesiaj teatroj, kiaj renkontiĝoj okazis jam dufoje enkadre de la Budapeŝta Printempa Festivalo en la jaroj 1982 kaj 1983. Sed tie kaj tiam Esperantan teatron reprezentis BET, PET, La Krizalido, Gibczyńska kaj elstaraj hungaraj geaktoroj...

Ŝajne la entreprenemo de la (lokaj) organizantoj estis pli granda ol ilia kapablo plenumi la taskon akceptitan. La iniciato estas laŭdinda, sekvinda, daŭrigenda, sed plialtigo de lokaj fortoj – nepre estus bezonata.

VerdaMonto '84

Kio okazis en Zielona Góra – Verda Monto? Fakte kunvenis studentaj kaj junularaj trupoj el polaj urboj Elk (*Cindrulino*), Bydgoszcz (*Sopiro*), kaj el Zielona Góra (SET). La sola eksterlanda trupo estis la hungara *Studió „G"* el Kecskemét. Rolis – kvankam en alia ĝenro – ankaŭ Mike *Sadler* angla pupteatristo, kiu ĉifoje debutis ankaŭ kiel kanzonisto.

Ĉarma estis la prezentado kaj deklamoj de la geknaba trupo „Cindrulino"; estis problemo nur kompari ilin al la studentaj trupoj. La konsisto de „Sopiro" laŭ aĝo apenaŭ diferencis disde tiu de studentoj (temas pri mezlerneja trupo), nek ilia prezentado postrestis al la studenta nivelo. La teatraĵo „Eta princo" estis bone surscenigita, kaj krom talentaj gejunuloj gravan rolon en ĝi havis la muziko, dank' al la eminenta fortepianisto: Zbigniew *Jodlowski.*

La gastiganta studenta grupo kontribuis al la festivalo per du prezentadoj. Unu el ili estis internacia, ĉar en ĝi ludis ankaŭ svedoj kaj anglo. Jam la titolo „Novaj ekzercoj" montris, ke temas pri eksperimenta teatro, kiu ekprovas utiligi ĉiaspecajn efektojn de avangarda teatro. La reĝisoro estis: Leszek *Lenandowski.*

La lasta prezentado de la festivalo estis monodramo de Beckett: „Lulkanto", kiun emocie prezentis s-ino Mira *Rzadzka* el Zielona Góra. La surbendigita teksto kaj senaga enhavo tamen donis malmulte da eblo al ŝi por disvolvi sian talenton.

Sendube la plej sukcesa estis la hungara trupo Studió „*G*". Ili alvenis al Zielona Góra el Kraków, kie ili prezentis ambaŭ pecojn de sia esperantlingva repertuaro: la misteran ludon de Béla Balázs: „La kastelo de princo Blubarbulo" en traduko de nia kunlaboranto Márton *Fejes,* kaj la originalan dokumentan dramon de Julian

Sceno el „Ni vivos". Lidia Zamenhof: Mária Fekete



Modest: „NI vivos". Kaj la tradukinto kaj la aŭtoro akompanis la trupon kiel lingvaj konsultantoj. La samajn spektaklojn ili faris ankaŭ en Zielona Góra, laŭ kiuj ili gajnis la solan premion de la festivalo, tiun de la publiko, laŭ plebiscito.

La Krakovajn prezentadojn spektis ankaŭ s-ino Maria *Gibczynska,* kiu „Blubarbulo"-n jam vidis antaŭ tri jaroj en Budapeŝto. La rolon de Judita tiutempe ludis profesia aktorino, Kati *Varga.* La nunan Juditan, Csilla *Gudricza* laŭdas, ke la rolŝanĝo ne estis rimarkebla. János *Beregszászi* estis vera Blubarbulo. En „NI vivos" la protagonistinon eminente ludis Mária *Fekete,* aliajn Zamenhofanojn kaj aliajn rolojn: Csilla *Gudricza,* Kata *Abonyi,* Ferenc *Samu,* Zoltán *Szij* kaj Sándor *Csósz.* La reĝisoro János *Beregszászi* montris ekzemplon kiel ŝpari aktorojn: li mem rolis tri, laŭ karaktero diversajn figurojn. La tereno, kie ili ankoraŭ devas progresi, estas la lingvo, ĉefe la prononcado. Sed jam post la prezentadoj, apud bivakfajro ili komencis konversaciajn studhorojn...

*

Tri tagoj en Verda Monto, en '84. Loĝigo en miriŋda intermonta ĉirkaŭaĵo, apartaj aŭtobusoj por liveri geaktorojn al spektakloj, agrablaj eksterteatraj programoj...

Tamen senteblis foresto de du invititaj jugoslaviaj trupoj, kaj la febra agado iamaniere anstataŭigi tiujn.

Marzena Gozdowska en „Eta Princo"

Ĉu estis do IRET aŭ SAETR? Se tiu lasta mallongigo ne plaĉas al organizantoj (aŭ ĝi estis ŝanĝita pro simileco al Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Teĥniko – SAEST–), ni proponus alian: estu kaj restu ĝi REST, Renkontiĝo de Esperantistaj Studentaj Teatroj, ne pli.

G.B. *Sipkov*

SET el Zielona Góra – kun eksterlandaj gastrolantoj

Sceno el „Blubarbulo"

(Fotoj: **László Somos**)



Unu poemo–en tri tradukoj

Dum la pasintjara Budapeŝta Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj la hungara aktorino Ildikó *Pécsi* en sia solprogramo «Leteroj» kun la muziko de la hungara komponisto György *Aldobolyi-Nagy* kantis ankaŭ la mondfaman poemon de la soveta poeto Konstantin *Simonov*: Ĵdji menja (Atendu min). Ŝi povis tiam elekti el tri tradukoj, kiuj ŝajnas egale atentindaj, do, ni prezentas ĉiujn tri. Ni ne malkovras ĉi tie, kiun el la tradukoj elektis la konata aktorino, por ne influi Vian decidon, kiun el ili elektus Vi mem? Ni volonte ricevus leterojn pri la prefero de la legantoj, kaj opiniojn ankaŭ pri tio, ĉu la publikigo de paralelaj tradukoj de poemoj interesus sufiĉe multajn legantojn?

Atendu min

Ĝis reven' atendu min,
Kredu min sen pruv'.
Kredu ĉiam kun obstin'
Sub la flava pluv'.
Kredu dum la neĝblovad',
Kredu dum somer',
Kiam ĉiu atendat'
Mankas je vesper'.
Kredu, kiam ĉe poŝtist'
Senas ajna send',
Eĉ se diras al vi trist':
Vanas la atend'.

Ĝis reven' atendu min,
Ne respondu jes
Je sugest' al via sin':
Venu la forges'.
Kredu panjo kaj la id'
Je mia pere',
La amikojn lasu fid'.
Jen ili kun ve'
Ĉe la fajro. Vin-amar'
Glase pro la mort'...
Kaj ne trinki kun ĉi ar'
restu en vi fort'.

Ĝis reven' atendu min,
Spit' al ĉiu mort'
Savos sin mia anim'.
„Gardis min la sort' " –
Ĉiu kredu, sed la ver':
El inter terur'
Min kondukis la esper'
Pri fid' via nur.
Restu nia kuna sci':
Gvidis min ĝis dom' –
Kredi firme povis vi
Pli ol ajna hom'.

Tradukis: Péter András Rados

Fidu: mi revenos

Fidu: mi revenos jam;
Firmu via kor'!
Fidu se aŭtuna dram'
Premas cin per plor'!
Fidu, kiam frostas ter',
Kiam ardas sun'!
Fidu min se eĉ leter'
Venis ne ĝis nun!
Fidu, se animojn jam
Ronĝis la detru'!
Oni moku eĉ ĉiam,
Tamen fidu plu!

Fidu, mi revenos jam,
Spitu kun obstin',
Eĉ se trudas ĉiu fam',
Ke forgesu min!
Fidu, se rezignis jam
Patro kaj filin'!
Fidu eĉ, se jam kompan'
Ne atendas min!
Glase min sepultas vin',
Perlas larm' por mi,
Tamen fidu veni min!
Ne kuntrinku vi!

Fidu, mi ellevos min
El ĉiu pere';
Kiu ne atendis min,
Mirenvios tre!
Scios tion neniu,
Nur vi kaj mi nur:
Vi kunestis en ĉiu
Lukto de terur';
Savis vi min, ho, kiel!
Simplas la mister':
Pleje fidis vi
Inter ĉiuj sur la ter'!

Tradukis: Imre Szabó

Fidu, ke mi venas

Fidu, ke mi venas jam,
Fidu eĉ sen pruv',
Fidu, se vin premas dram'
De la flava pluv',
Fidu, kiam siblas neĝ',
Kiam ardas sun',
Fidu, se neniu eĉ
Gardas jam iun.
Fidu eĉ se el la for'
Mankas la leter',
Fidu, se en ĉiu kor'
Mankas jam esper'.

Fidu, ke mi venas jam,
Fidu per obstin',
Ĉiu diru eĉ ĉiam,
Ke forgesu min.
Kredu filo kaj patrin',
Ke mi pasis jam,
Kredu ne revidi min
Eĉ ĉiu kompan'.
Ili trinkos je memor'
El amara vin',
Ne kuntrinku, restu for,
Nur vi gardu min.

Fidu, kaj mi venas jam
Eĉ tra mortoj mil.
Ĉiu pro la stranga fam'
Gapos kun admir',
Kaj komprenos neniam,
Ke vi savis min
Per via fidela am'
El la murda fin'.
Kiel restis mi en viv',
Scios nur ni du:
Ĉar vi fidis en la driv',
Fidis ĉiam plu.

Tradukis: Imre Szabó

Pál Avar

Kiam mi estis homo

Kiam mi estis homo, mi ofte renkontiĝis kun mia neforgesebla amiko, kiu same estis homo. Ni vizitadis la domon por interparoli – apud la Homonnay-gastejo.

Tiutempe en la menciita konstruaĵo loĝis neniu. La ĉambroj resonis de malpleno. Troviĝis interne meblaro, sed vivestaĵon al ni similan ni vidis nek en la loĝejo, nek en la koridoroj de la granda ludomo dum multaj monatoj. Aŭ nur mia rememoro trompas min? Mi ne scias.

Ni elnombru la meblojn! Ni ambaŭ sidadis apud la eluzita tablo kovrita per vezikiĝinta plakaĵo kaj per elŝirita puntkovrilo. Kelkfoje knaris la seĝo. Tiam mia amiko demandis min:

– Kiel vi fartas?

– Dankon, bone – mi respondis ĉiun fojon. – Kaj vi?

– Ankaŭ mi bone – diris mia amiko distrite. Poste li metis la sekvantan demandon: – Ĉu vi havas cigaredon?

Ekde nia konateco li havis nek cigaredon, nek kutiman vestaĵon, nek propran loĝejon, nek familion. Nenion. Ankaŭ mi mem ne havis loĝejon, nur malkomfortan, malvastan subluaĵon, tial ni renkontiĝis en la domo apud la Homonnay-gastejo. Oni ne embarasis nin tie. Nek en la domo, nek sur la korto.

En niaj priparoloj temis pri tio, kial la homo vivas, kiel oni devus aranĝi la aferojn de la mondo, kaj pri analogaj enuo-pelaj aĵoj. Por ilustri, kiajn senutilajn temojn ni pritraktis, mi mencius ekzemplon: la paruoj kvikante interkonsilas, kio estas la kaŭzo, ke unu birdotrupo ricevas nur ĉi tiom da raŭpoj, dum la aliaj ricevas duoble, dekoble kaj centoble tiom... Kaj kiel oni povus helpi pri tio?

Mia amiko kutimis legi librojn.

Li portis foje al mi, sub la akselo, du aŭ tri ekzemplerojn el sia libraro. Tiam li diris al mi:

– Ankaŭ vi legu ilin! Legu ĉi tiujn librojn!

Mi komencis legi. Ekskluzive por lia plaĉo. Mi legis diligente. La fremdajn vortojn mi elskribis en apartan kajeron.

Unutage mi ĉesigis tion. La legadon. Eĉ, mi diris tion al li. Ankoraŭ nun mi rememoras pri la horo... Bela, brilanta tagmezo estis, sunradioj falis sur la tablon. Ili ludetis kun la flirtantaj bukloj de mia amiko. (Ankaŭ tiajn esprimojn mi legis en tiuj libroj.) Mi rememoras lian vizaĝon, kiam – riskante nian amikecon – mi lin sciigis:

– Ne koleru min! Kiu ne havas familion, infanojn, tiu ne povas kompreni, ke oni devas streĉe labori por la siaj, por... Ĉu vi pensas, ke mi havas tempon por amuziĝi?

Mi ne povis daŭrigi, ĉar la okuloj de mia amiko subite tristiĝis. Mi ja ne deziris lin malĝojigi, ĉar mi konis lin gaja, kaj mi volas lin rememori, kiel ĝojplenan, okulbrilantan junulon. Mi konsolis lin, ke li daŭrigu la legadon de tiuj libroj, kaj kiam ni renkontiĝas, li rakontu al mi ilian mallongan enhavon. Mi sincere konfesas, ke mi preferis lin aŭskulti. Lia voĉo sonoris profunde kaj metale; ĝi ankaŭ nun resonas en miaj oreloj. Eĉ, de kiam mi ne vivas, ĝi havas ian strangan, mi ne scias, kian magian ravon. Kiel ŝe ŝriko haltas en la aero. Sed ne tiom akra, prefere penetranta. Certe ĉiu homo travivis tian: la sono, eĉ ĝia resono jam eksilentis, tamen ĉiu ĝin aŭdas plu. Mia kompatinda amiko povus tion rekte klarigi. Li povis ĉiam esprimiĝi. Tio estis lia sekreto. La sekreto de liaj tutmondaj sukcesoj.

Li ja povis danki tion al sia escepta karaktero: al siaj braveco kaj korekteco.

Kio en koro, tio sur lango.

Kio estis lia nomo? Mi hontas, sed mi ne povas diri tion, eĉ se oni mortpafus min.

Unufoje, kiam ni sidadis kiel kutime, post longa hezitado mi alparolis lin:

– Diru al mi, kial mi amikadas kun mi? Ja mi estas pli stulta, ol iu ajn botoŝtipo. – Mi rigardis al li maltrankvile pri la hazardo de mia plej kara trezoro, nia amikeco. Tamen, ĝi jam ĝenis min, ĉar sub la fenestroj certaj nekonatoj komencis kunveni, kaj kiam ni elpaŝis el la domo, ili disiĝis, kiel ratoj.

– Tial, ĉar vi estas simpla kiel la popolo – diris mia amiko kun akcento de fraŭlo, kiu flirtas al sia amatino. Mi eĉ ruĝiĝis honteme. – Nu, legu cent librojn aŭ mil, tamen vi restos simpla – li daŭrigis. – Via esenco estas la simplegeco.

– Estu tiel! – mi diris. – Sed al vi ne licas min malestimi!

Poste mi planis ĉikane lin plue. Kiom valoras por mi ĉi tiu amikeco? Anstataŭe mi povus fari ion pli utilan. Ekzemple mi devus eduki miajn infanojn. Ili ja estas needukataj, de kiam ĉi tiu parolado, la multaj paroladoj konfuzis mian kapon. – Ĉu vi kredas, ke vi konas min? Ĉu vi vere kredas, ke vi konas la popolon? – mi atakis lin.

Li konsterniĝis momente, poste li komencis pripensi miajn vortojn. Lia vizaĝo dronis en la manplaton kaj li sidis tiel dum kelka tempo. Li ankaŭ estis bela. Lia frunto lumigis la ĉambron. Kune kun li mi neniam sentis la loĝejon malplena. Kvazaŭ la tuta ludomego estus pleniĝinta per homoj al ni similaj. En mia fantazio aperis maljunuloj kun pipoj, kaj en la koridoroj korpulentaj virinoj. Mi pensis, kvankam nia vivo estas dezerta, troviĝas homo por

pentradi ĉirkaŭe en la aero kolorajn desegnaĵojn.

– Mi pripensos – parolis mia amiko –, kion vi antaŭe diris al mi. – Poste li stariĝis kaj eliris.

Longtempe mi ne vidis lin. Sed mi aŭdis, ke li aperis tie kaj tie, ankaŭ en loĝejoj. Ĉie li pritraktis siajn ideojn, ĉie oni prezentis al li glason da vino, unu-du cigaredojn, oni eĉ permesis, ke li povus preni la infanojn en la sinon. Certe li dume estis okupita per la propraj pensoj kaj ideoj. Tial mi ne invitis lin al ni. Por kio? Por ke li sidu sur la seĝo, kiel fakiro sur la najloj? Por ke mia edzino konfesigu min: kiapseca viro estas ĉi tiu? Kion li volas de vi? Al kia afero li volas vin entiri? Vi jam ne povas pensadi facilanime, vi ja havas familion.

Mi nun scias, ke estus pli saĝe kunvenadi ĉe ni, kaj ne en la domo apud la Homonnay-gastejo... Jen estas domaĝe! Mi ja tiom preferis vivi!

„Kion mi povus nun fari? " – mi cerbumadis dum sendormaj noktoj. Dumtage mi ŝancelis la kapon, ĉar ege mankis al mi mia garabonca amiko. Ne tial, ke mi esperis – tiam aŭ en la estonto – iom ajn profiton de li. Ne. Mi ne scias, kiel. De lia personeco emanis ia forto – sugestio. Li bezonis nenian instigon, li kontentiĝis per nenio, kaj per la io, per kio oni ĉi tie kaj tie lin regaladis. Li mem konfesis foje, ke li ne manĝis de tri aŭ kvar tagoj. Tamen li ne sentis malsaton. Eble li estis tiam pli malforta ol alifoje. Oni povas imagi tion. Mi mem, kompatinda homo, neniam spertis veran malsaton. Ni, simplaj malriĉuloj, manĝadas ĉiuhore, ĉiuminute, ni ĉiam mordetadas ion. Ĝustiginte la maŝinon, ni ĉirkaŭiras, observadas ĝin, ĉu ĝi ne bezonas oleon aŭ ĉu sufiĉan ferpecon ĝi havas en sia buŝo. Poste ni viŝas la manon en nia pantalono, elprenas la poŝtranĉilon kaj ek! Ni enstomakigas iom da glutoj da lardo kun cepo kaj pano, por ke ni pasigu la tempon. Ekskluzive por tio. Kvankam ni ne malsatas, tamen ni manĝetadas iom.*

Venas la laborejestro. Ni demetas la manĝaĵon sur la ilkeston. Li iras al la maŝino, ne rigardas al ni, interesiĝas li nur pri la maŝino. Tiam ni kunrigardas, kaj se li estas elirinta, ni daŭrigas la manĝadon.

La fervojistoj, fininte la deforon, kiam ili hejmenvojaĝas, kutimas manĝi vidalvide el paperkofretoj. Poste ili freŝe kartludas frapante sur la supron de la kofretoj.

Sed nun ne temas pri ili. Mi nur ĉiam forgesas la propran vorton, simile al virinoj, kiuj mem ne scias, kion ili volas diri. Ve, mia amiko! Unufoje li falis en malliberejon. Baldaŭ oni liberigis lin. Iomete malgrasiĝinte, sed entuziasme li rakontis, kiam ni denove renkontiĝis en nia kutima rendevuejo:

– Mi rezervas interesan novaĵon por vi. Mi havis ian aferon aranĝi en la arestejo... kaj mi...

– Afero aranĝi... en karcero? – Mi komprenis nenion, sed mi ne aŭdacis trudi demandojn, ĉar liaj okuloj brilis tiel, kiel neniam antaŭe. Tamen lia vizaĝo... nur el osto kaj haŭto, la korpo gracila, la frunto en faltoj, en sulkoj, kiel ĉe troŝarĝita, zorgopremata junulo, kiu devas perlabori panon por granda familio, ĉar la familiestro mortis, ankaŭ la patrino malsanetas, kaj liaj fratinoj ankoraŭ pupludas kun la najbaraj infanoj. Kiu do estu la patro, la viro en la domo? Nur li mem. Li jam sufiĉe povas elteni la malfacilaĵojn: liaj brakoj kaj piedoj estas muskolfortaj, sub la nazo li havas lanugan lipharon, kaj li cigaredfumas. Se li foje edziĝos, li povos fanfaroni antaŭ la edzino per sia prahistorio.

Do li havis nediskuteblan superecon kontraŭ mi en miaj okuloj. Mi mem estis nur lia pala ombro, kiu fetiĝas tien-reen en la mondo. Tiu ĉi ombrulo ŝteliras, etiĝas, spekulas kaj kalkuletas, sed baldaŭ li pripensas ĉion alimaniere. Li pasigas, pasigaĉas la tempon kaj finfine li devas konstati, ke li atingis nenion. Kial? Ĉar li ĉiam konsideradis, kiel oni opinias pri li, kiel oni taksas liajn agojn, kiel rigardas al li liaj infanoj kaj tiel plu.

*Jen mi ankaŭ nun sentas kontinuan timon: ĉu mi ne pensadas iom frivole, kaj pro tio ankoraŭ-foje mi devas honti. Sed li kulpas, mia amiko, ĉar li ellogis min de mia litaĉo, el la fosaĵo de la feliĉa malklereco, kie mi ĝis tiam vivis en la naiveco de bestoj. Mi ĉiam konjektis, ke grandega maljusto regas la mondon, tio estas, ke eraras la kalkuloj. Tamen, mi kunpremis la dentojn kaj suferis. De tempo al tempo mi turpe blasfemis buntigante miajn sakradojn. kiel matjoj** la jakon. Ĉi tiun sciencon mi hejmenportis de la aktiva militservo kune kun mia ekssoldata libreto. Kiam la blasfemo ne kontentigis min, mi drinkis duonan litron da vino, kun sodakvo. Mi vidis, ke ankaŭ aliuloj faras same, poste ili eltiras la akran poŝtranĉilon aŭ trankvile ekridaĉas.*

Mia amiko ekflamiĝis, kiam mi prelegis ĉi tion. Li iris kaj venis en la ĉambro kaj gestadis:

– Vi, popolo! Vi stulta ŝafgrego sen paŝtisto kaj sen Mesio! Vi gapante atendas, senĉese atendas la estron, kiu regvidus vin al la abunda paŝtejo, al la Paradizo. Kvankam vi devus mem krei ĝin. Kaj nome ĉi tie, sur la tero.

Li menciis ankaŭ scienculon, unu inter aliaj, kiu jam posedis la integran veron kaj efikan ilon kontraŭ tutmonda blindeco kaj duonklereco. En li elformiĝis la harmonio inter la estaĵoj kaj la senviva materio.

Bedaŭrinde ankaŭ lian nomon mi forgesis.

Malbone estas, ke la homa lingvo tiel ligiĝas al la vortoj, ke ĝi devas suferi, se oni volas esprimi per ĝi ion simplan.

Tamen, mi provos!

Tial la homo fariĝis la fantomo kaj la rabobesto de la tero, ĉar li trovas ĝojon en tio, ke li rigardu la objektojn de ties inversa flanko. Li instalis sin por ŝtelado, por perforto, kvankam per frateco li pli atingus. La homaro konspiris por la konkero de la universo – ankoraŭ estus en ordo –, sed ĝi dume preparadas sian memdetruon, kies obstaklo ĉimomente estas komplete deflankigita. Komplete. Ĉu vi ne scias tion?

---

* La garabonco (hungare: garabonciás) vivas en la popolfantazio, kiel migranta studento kun mirakla kapableco

** matjoj – popolgrupo en Nord-Hungarujo, famekonata pro sia bunta popolkostumo

Jen la Pleneco de l' Tempoj! Ekparolu la ŝtonoj, la arboj kaj sangu la rokoj! Jen la tempo por la elverŝado de la sep glasoj, la tago de l' kolero! Jen eksonu la tri veoj! Ĉu vi ne aŭdas, ĉu vi ne vidas tion? Ĉu vi ne sentas la ventegon de la Lasta Juĝo?

Ie oni pretiĝas por la murdo de l' homomilionoj.

Eble ekstermos sin la homaro? Nun jam ĉio eblas. Poste sekvas la nenio. Aŭ tiam komencos reviviĝi la mondo. Grandega ĝemo plenigos la ĉielon kaj la teron. Tiu ĝemego certe forblovos la mortigan pulvon, kiu ekfumis el la armiloj.

Post longa silento la arboj ekfloros memfide. La tremantaj lacertoj kuraĝe elŝovos sin el la arbustoj kaj libere sunbanos sin akomodiĝante al la ĉiopovo de la lacertvivo. Kaj ĉiuj kreaĵoj solenos, ke sentime, sekure ili povos demeti ovojn inter la branĉforkoj, en la improvizitajn nestojn. Memvolaj kopulacioj komenciĝos: fiere paŝados la maskloj kaj delice pompos la inoj, ke ili povas vivi sub la devo de l' kosmo.

Eĉ la leono ne timos sian fortegon.

Kaj la sola kaŭzo de ĉi tiu triumfo estos, ke la homo mortis – li sukcesis sin ekstermi.

✱

Pri ĉi tiuj kaj pri similaj erudicioj instruis min mia amiko, ĉi tiu senkompara kaj vera viro, kia mi mem neniam povus esti. Neniam!

Tamen li ne heroldis ĉi tion antaŭ la publikeco. Li ĝuste sciis, kiom oni povas percepti el lia kono. Apenaŭ pli ol mia etfingro.

Tiel li parolis al mi laste, kiam ni ambaŭ kaj la aliaj staris katenite antaŭ la tribunalo... Li mallaŭte flustris, por ke neniu ĝin aŭdu:

– Mi jam komprenas la popolon. Mi sentas lin sur mia artiko – li diris kaj triste ekridetis.

Uniformulo murmuregis al li: la regulo malpermesas tion. Flustri? En la lernejo, tie! Kion ankoraŭ? !

Mi memoras pri mia amiko, kvazaŭ nun li sidus ĉi tie apud mi kun rigardo ornamita per sangmakuloj. Sinjoro Talaro ekparolis:

– ... je morto!

Li diris tiel, per ĉi tiu vorto, kvankam li mem mortis neniam.

Ho, je morto!

Mi tuj svenis kaj vekiĝinte ekkriis:

– Kaj poste? Kio venos? Kio?

Neniu al mi respondis. Ni jam ne vivis – en iliaj okuloj, ni jam kuŝis en la humida foso, bestkadavroj, ho!

La junulo, mia neforgesebla amiko, kiu ankoraŭ vivis – nur en miaj okuloj – per sia rigardo deadmonis min: Silentu!

Kaj mi silentis. Eĉ ne unu vorton. Mi diris nenion. Ĉar la lingvo estas ligita al la vortoj. Vortoj!

La proksiman tagiĝon, sub la unuaj sunradioj, oni pendumis nin. Mia amiko ankaŭ tie estis la unua. Mi mem?... Mi nur postlonge lin sekvis. Pervorte, en la disiĝinta nebulo oni korekte pendumis nin.

Nu, kial? Ke oni – la dormemaj oficistoj kaj antaŭ ili la paperoj – kion pretekstis? Vidu, pri tio mi jam absolute ne memoras.

Pardonu al mi, homoj!

Zora Heide

Al okuloj viaj blindaj

Flavaj sunaj strioj el ĉielo blua
jen aŭrorajn buklojn delikate tuŝas
ŝaŭmanta roso elŝprucas Diajn gutojn
sur ruĝflamaj lipoj revas la sopiro

La printempaj tagoj flirtas kun feliĉo
ondoj de la lumo ludas kun folioj
la kantbirdoj trilas sur ruĝa tegmento
supre frenezumas gaja firmamento

Pompaj krinolinoj sur arbarfeinoj
dancas kun la fratoj de juna zefiro
orkestron cikadan kapelestras rano
en verda salono de la maskobalo

Malfermu fenestrojn metu la aromon
en la budoaron kie splenas koro
laca de la longaj vintre blankaj noktoj
kaj miajn okulojn vi volonte prenu
ekpaŝu eksteren kie regas suno
la senmorta princo kaj radiaj damoj

Gvidu fantazion de via imago
pri la sep koloroj de la ĉielarko
preter nigraj ombroj de mia sufero
kiu spasme ploras kaj sange doloras
pro la tragedio de la blinda rondo

Sed pri malboneco kion al vi diri
dum ĝi preterpasas la nescion vian
ĉar kun viaj manoj vi karese palpas
veluran vizaĝon de l' anĝela ĉarmo

PANORAMO

Kim Il Sung en Budapeŝto

János Kádár kaj Helmut Kohl

Altrangaj gastoj en Budapeŝto

En junio Budapeŝto havis du altrangajn gastojn – tio bele demonstras la riĉajn kontaktojn, kiujn Hungario havas kun tre multaj landoj de la mondo.

Komence de la monato vizitis Budapeŝton *Kim Il Sung,* prezidento de la Korea Popola Demokratia Respubliko. Tiu ĉi evento estis tiom pli atentinda, ke prezidento Kim Il Sung vizitis lastfoje nian landon antaŭ 28 jaroj, printempe de 1956. Liaj intertraktoj kun la gvidantoj de la Hungara Popolrespubliko kaj kun tiuj de la Hungara Socialisma Laborista Partio certe kontribuos al la ampleksiĝo de la interrilatoj de Hungario kaj la Korea Popola Demokratia Respubliko.

La alia grava gasto de la monato junio estis Helmut *Kohl,* kanceliero de la Federacia Respubliko Germanio. La ekonomiaj kaj kulturaj kontaktoj inter FRG kaj Hungario estas tradicie bonaj – tiu ĉi vizito profundigis tiujn bonajn kontaktojn. En la gazetara konferenco, aranĝita fine de la vizito, la kanceliero de FRG nomis „elstare sukcesaj" siajn intertraktojn kun la hungaraj gvidantoj.

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

PANORAMO

Sukceso de hungara filmo

Dum la ĉijara Filmfestivalo en Cannes la duan plej gravan premion – la Specialan Premion de la Ĵurio – oni aljuĝis al la hungara filmo *Taglibro por miaj infanoj,* reĝisorita de Márta *Mészáros.* La filmo ĉerpas sian temon el la komenco de la kvindekaj jaroj, periodo tre multaspekta de la nova hungara historio.

Márta Mészáros transprenas la premion en Cannes

«Skála Metró» – nova granda magazeno en Budapeŝto

Budapeŝto riĉiĝis per plia nova granda magazeno, kiu estis konstruita apud la Stacidomo Nyugati, do en loko tre multe frekventata. La magazeno estas rekte atingebla ankaŭ el la urba metroo. Unikaĵo de tiu ĉi magazeno estas, ke dum la aŭtuno ĝi enkondukos la tn. „lini-kodan sistemon", kiu signife plisimpligas la laboron de la kasistinoj. Skála Metró estos la unua magazeno en la socialismaj landoj, kiu aplikas tiun ĉi modernan sistemon.

Skála-Metró en Budapeŝto

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

METALLOGLOBUS



Ni rekomendas al la atento de utiligantoj de subtegmentaj spacoj kaj mansardoj

la TEGMENTAN FENESTRON „TÉPA"

La tegmenta fenestro estas produktita el ligno, ekstere kovras ĝin zinklameno, la vitraĵo estas varmizola. Ĝi ekzistas en funkcivariantoj glita kaj balanca. La tegmenta fenestro estas utiligebla por tegmentoj kun klino de 30-60 gradoj.

Dimensioj: 85x115 cm

85x150 cm

Disvendas ĝin: Deponejo de Konstrumetalaĵoj de la Entrepreno de Metalaĵoj kaj Produktiloj „Metalloglobus":

Budapest XIII. Dózsa György út 57. Telefono: 208-420

Informas la Servo por Klientoj

REVUO DE REVUOJ

La impulsoj de niaj kongresoj ĉiam puŝis antaŭen la movadon en la kongreslando. La bulteno de Kanado, ALUMETO (7-8.) – spite la titolon 40 paĝojn dika! – jam informas pri gravaj sukcesoj, ankaŭ pri la vasta kampanjo tra multaj provincoj. Pere de amaskomunikiloj, lernejoj kaj societoj oni vekis intereson – kaj disvastigis konojn – pri Eo: rezulte jam pli ol *600 personoj studas* ĉe perpoŝta kurso, krom multaj aliaj intensaj (t.e. mallongigitaj) E-kursoj. Kreskis la membraro kaj la aktiveco en la rondoj, la publiko vigle interesiĝas kaj same la gazetaro. Estas vere ĝojinde legi: „...foriĝis la iama movada inerto kaj sinkontento." Oni reeldonis lernolibron, aperis *„Esprim-libreto por turistoj"* (A-E-F lingva). Viglecon montras ankaŭ la bunta enhavo de la bulteno; en ĝi legeblas interesaj konfesoj koncerne E-on, kaj detale fosantaj recenzoj de R. *Eichholz* (mi salutas precipe ankaŭ pro ĝia eminenta klareco tiun pri la per-Esperanta maŝina tradukado de Nederlanda firmao).

Se ni troviĝas jam ĉe la Pacifiko, tiam niaj pensoj „per facila vento" flugu pli malproksimen. En THE AUSTRALIAN ESPERANTIST (1-2.) iomete envie mi legis pri ĥor- kaj dramo-konkursoj, okazintaj dum la E-kongreso de tiu kontinento – en januaro. En diversaj E-societoj preparis sin tri, respektive kvar grupoj por prezenti kantojn kaj teatraĵojn (inter ili originalan de Ralph *Harry*) en nia lingvo, konkurence antaŭ la kongresanoj. Mi samopinias kun la redaktoro, Herbert *Koppel*: la kunlaboro de entuziasmaj samideanoj produktis tre brave!

Jubilea 100-a numero de STARTO aperis kun abundaj lingvaj temoj kaj recenzoj, ĉiuj seriozaj kaj legindaj. J. *Kořínek* donas kvazaŭ recenzon pri la literatura kolektaĵo de ĉeĥaj verkistoj *„En la koro de Eŭropo"*. La prudentajn rimarkojn mi trovas atentindaj, precipe pri enkonduko de nuancigaj sinonimoj pro certaj stilaj pretendoj... Li avertas ankaŭ pro maldisciplinemo de kelkiuj, uzantaj *superflue novajn* fakvortojn, sen serĉi inter la jam ekzistantaj! Samtiel malkonvenas, se *alilingvan* fakvorton oni volas enkonduki en E-on laŭ ĝia *loke modifita* formo, eĉ ofte superflue. Sed kia misaĵo estus A: dispatcher – dispeĉisto? ja ni havas la klaran *disponisto!*

BULGARA E-ISTO (3, 5.) eventuale pro atentigo al ĝusta lingva evoluo, publikigis atentindajn artikolojn (de Bokarev kaj ADA). Niaj gravaj lingvistoj trafe kaj prave argumentis kontraŭ dogmuloj, same kontraŭ „naturalismaj" tendencoj, kaj aludis la tute ne elĉerpitajn riĉajn eblecojn por krei subtilajn esprimojn. Kaj se necese, la novaj vortoj venu bremsite, „poiom, ne lavange". Sed ĉu „seks-rilate" oni devos revizii nian vortaron – kiel legiĝas en E-A FINNLANDO (3.) – oni rajte pridubas. Eble miaj konoj trompas, sed miascie *nenie* en la mondo seriozaj lingvistoj okupiĝas tiucele, nek revizias etnolingvajn vortarojn. Nek por komunseksa pronomo de la 3a persono, en lingvoj havantaj similajn kiel *li-ŝi-ĝi,* nek por vira kaj ina pronomoj, se male ilia lingvo havas nur komunseksan... Superflue daŭrigi pri tiu novigemo *ekskluzive E-a.* Mi jam atendas, ke la angla lingvo baldaŭ haltos en sia disvastiĝo (feliĉe), ĉar ankaŭ tiurilate ĝi portas ege konservativajn trajtojn...

Turninte kelkajn paĝojn min plezurigis gaja–ironia satiro, datita je la *unua de aprilo* (kompreneble nur hazarde), pri granda malkovro en Esperantologio: Zamenhof kreis E-on surbaze de la... finna lingvo! Uzante la eblajn (kaj neeblajn) metodojn de la plej moderna lingvistikemo, per harfendaj demonstradoj s-ano malakademiano *Leporo* sukcesis ĝis suk-ĉeso pruvegi, kiel sagace Z ĉerpis gravajn erojn el la bela finna lingvo, kiu iĝis do la *bazo* de Eo. Ekzemple la adverban finaĵon *-e* Z simple prenis el la finna kauniist*i* (bele), nur ŝanĝante *i je e* pro nia infinitivo... La interlingvistika satiro estas diafana kiel sateno, aŭ se vi volas: sat-ino.

La gravega ĵurnalo *„Le Monde"* en pluraj numeroj enhavis diskuton pri Eo kiel interlingvo por Unesko, precipe pro ties konata financa krizo, kaŭze de la Usona eksiĝo (kies demokratoj ŝajne naŭze rifuzas demokratajn voĉdonadojn en Unesko). Laŭ la artikolojn represinta FRANCA E-ISTO (352.), la publiko povis konkrete ekkoni la avantaĝojn kaj uzeblecon de Eo en internacia forumo, krome legi lertajn rebatojn al la kutimaj stultaĵoj de iu oponanto. Tre necesas multe da similaj diskutoj en naciaj gravaj gazetoj, ĉar la nocio de Eo estas ankoraŭ tro malproksime – ankaŭ en grandaj landoj – de la minimuma konateco ĉe la publiko!

Mi vere ĝojas vidante la novan aspekton de AŬSTRIA E-REVUO (1-3.), kiu raportas pri lerte organizataj preparlaboroj de la centjara jubileo. Tiurilate jam nun gravas la ĉiudimanĉaj E-elsendoj de *Radio Vieno* (9,45 h GMT), bone aŭskulteblaj en tre vasta sfero. Pli serioze aspektas ankaŭ VE–LO, bulteno de Vojvodio en Jugoslavio: ĝin redaktas sperte kaj varie Tibor *Sekelj.*

Pere de INFORMILO (1.) de la Int. E-Muzeo en Vieno ni ekscias pri la *Veterana E-Klubo,* kiu i.a. intencas eldoni en 1987 jubilean *memorlibron,* helpe de la travivaĵoj kaj raportoj de niaj fidelaj veteranoj. Verŝajne multaj prezentos siajn rememorojn kaj interesajn fotojn al la redaktantoj, kiuj celas eldoni prestiĝan libron, indan al la Jubileo.

Ervin *Fenyvesi*

Szilárd Bálint

FABELO PRI KOLOMBOJ

En la mankavo de la fama verkisto nestis juna turtoparo. La bronzan statuon de la urba forumo okupis do arbitraj enloĝantoj. La loka ĵurnalo informis pri la sensacia evento, kaj sekve kelkaj, kiuj preteriris la statuon, rigardis supren kaj ekvidis kelkajn pajlerojn, kiuj pendis el la bronza mankavo de la fama verkisto.

La postan tagon la ĵurnalo publikigis denove artikolon pri la ĉarme kverantaj turtoj, kaj rimarkigis, ke tiuj kolombetoj ŝajne trovas tre konvena la senpermesan loĝejon. La nesto estas nediskuteble pura, ĉar ne estas interne necesejo, sed ĝuste tial ekstere troviĝas blankaj makuloj surstatue, eĉ – terure eldiri – sur la kapo de la fama verkisto! Oni devas ion fari, ja la birdo estas malracia besto, kiun direktas la instinktoj. Tute kontraŭe, la homo estas la plej perfekte kreaĵo de la naturo, ĉu ne, tamen ĉirkaŭe la stratojn malbeligas ruboj...

La estro de la oficejo pri urba pureco gratis sian nukon, leginte la pikeman artikolon, kaj ekiris inspekti la situacion. Konstatinte la ĝenatecon de la verkisto, li ordonis purigi la statuon per ŝprucigilo. Venis laboristoj, kaj per fortaj akvoradioj forlavis la birdajn makulojn, sed dum tio ili deŝiris ankaŭ la neston el la verkista mano. La kolombetoj timigite forflugis al proksimaj arboj por deskui la akvon desur siaj plumoj.

La loka ĵurnalo denove informis la publikon pri la novaĵo, ne forgesante plendi pri la barbara ago de la urba oficejo koncerne la birdetojn. Oni ne tiamaniere zorgu pri la interesoj de la literaturhistorio!

La loka ligo pri bestoprotekto tuj kunsidis pridiskuti la danĝeran aferon kaj sendis delegitojn al la urbestro, deklaron por la ĵurnalo, postulante favorojn al la birdoj.

Post tagoj la turtoparo revenis kaj ekkonstruis novan neston en la verkistan manon. Ĉirkaŭ la monumento sur arboj pepadis centoj da paseroj, sube la benkojn troornamis iliaj spuroj. Tio delonge indignigis la ripozantajn maljunulojn kaj la patrinojn kiuj gardis siajn infanojn tie ludantajn.

Dum la ĵurnala disputado intervenis ankaŭ la oficejo pri naturprotekto, kaj akre rifuzis la proponon, kiu emis forigi la arbojn, por solvi la problemon. Nun la urbestro senprokraste kunvokis la urban konsilion por decidi iel ajn.

La protektantoj kaj de la birdoj, kaj de la naturo feliĉe interkonsentis pri la neceso kaj valoro de la birdoj kaj arboj. Ili eksplikis dum la kunsido, ke la veraj pekuloj estas la homoj, kiuj surstrate lasas rubojn, sur herbejoj lavas aŭton. Ilin apenaŭ punadas la polico, sed la senkulpajn birdojn la magistrato atakas per ŝprucigilo.

Dume en la verkista mano pretiĝis la nova vesto, la turtinjo eksidis sur la ovoj. La avinoj fervore informis la infanojn pri la ĝermantaj vivoj kaj pri la neceso ŝirmi la kantbirdojn. Alitage aro da infanoj per viŝtukoj diligente purigis la statuon, eĉ la benkojn. La maljunuloj kapjese salutis la infanajn agojn.

En la urbodomo la disputo jam ĵetis sparkojn. Oni diris, ke la nombro de stratpurigistoj ne sufiĉas. (La urbestro: donu pli da mono tiucele!) Sonis kolera voĉo: estas netolereble, ke fama verkisto tenu en la mano neston kun rukulantaj kolomboj! Oni asertis, ke pro la skandalema ĵurnalo la tuta regiono priridas la urbon. La policestro neis la ridaĉon pri la urbo, sed proponis apliki la bildon de la monumento-verkisto tenante kolombojn enmane en la nova blazono de la urbo, kiel belan simbolon. La aŭtistoj plendis pri la senorda riverbordo; flanke de la industrio oni konsideris tute bagatela la kolombo-aferon kaj ne tre riproĉinda la stratan purecon. La redaktoro postulis balotadon en la urbo por koni la publikan opinion. El la akvoprovizejo oni proponis, ke ĉiu oficejo kaj instanco balau antaŭ sia pordo kaj ili lasu ekzisti kaj la arbojn, kaj la birdojn.

La urbestro dankis pro la saĝaj alparoloj, kaj promesis, ke la magistrato traktos la tutan aferon, kaj decidos pri la farendoj.

* * *

Kara Leganto! La decido ankoraŭ ne alvenis al la Redakcio, tial ni petas, konceptu ĝin en ne pli ol 30 tajpitaj linioj. La plej bona decido meritos libropremion kaj ni publikigos la tekston en H.V. Limdato: du monatoj post la alveno de tiu ĉi numero.

DAŬRIGO

de la novelo „Servofaro de Eva"
aperinta en la n-ro 1984/1. Ĝia aŭtoro estas Elvira Körbl, Vieno, A.

La saman tagon Eva foliumis la dosieron de la du krimuloj kaj studis ilian vivon, familion kaj konatojn, rigardis pedante la troveblajn fotojn, kaj notis pri la nun ŝtelitaj vestoj. Ŝi baldaŭ estis certa, ke okaze de renkonto ŝi ekkonos ilin. Dumnokte ŝi iom cerbumis, kiamaniere eblos aresti ilin sen fortaj detektivoj, ja ŝi devos sola agi. La du krimuloj estas ĉion riskemaj uloj, ili eble havas jam ankaŭ armilojn. Do? La sola ebleco ŝajnis al ŝi uzi ian insidon.

La postan tagon ŝi surmetis forte eluzitan pantalonon, buntan puloveron malpuran, flavajn botojn, fine ŝi ŝajnos vaganta ulino. Per trajno ŝi veturis al la urbo, kie loĝis la patrino de Stefano. Tie ŝi singarde alproksimiĝis al la patrina loĝejo kaj ĉirkaŭrigardis en la proksimeco. Ŝi eniris kelkajn drinkejojn, ĝis ŝi rimarkis la karakterizan vizaĝon de la patrino, kvazaŭ timiga sorĉistino en fabeloj, tiel ŝajnis al Eva. Kuraĝon, ŝi diris al si, kaj „stultmiene" rigardis, kiel la maljunulino kartludas kun kelkaj jam ne sobraj gastoj. Ŝi facile gajnis sinsekve, kaj Eva ekvidis foje, kiel ŝi ŝtele elprenas „novan" karton el sia jupo.

Post kelkaj interridoj la maljunulino demandis de Eva:

– Ĉu vi havas monon? Venu kaj ludu kun ni!

– Ankoraŭ ne... mi nur admiras la interesan ludon...

La drinkuloj ekridaĉis kaj inviteme rigardis ŝin, sed tiam aŭdiĝis ekstera fajfado. La gastoj eksaltis: „razio! " – ili kriis. Eva kaptis la manon de la maljunulino kaj petegis:

– Helpu min, kara sinjorino, helpu! ... mi ne havas legitimilon, oni arestos min!

La maljunulino tiris Evan kun si tra la korto al la najbara ĝardeno kaj tra alia domo al iu strateto. Sukcese! En la hejmo de la patrino Eva rakontis, ke ŝi serĉas kaŝejon por sia amiko, kiu kunhavas ankoraŭ iom da predo, ŝtelita el juvelvendejo. Lin la polico forte serĉas, do li ne riskas veni en la urbon, kvankam li bezonas ankoraŭ resaniĝon pro alta febro. Kiel peranto de kaŝita kaj sekura loĝejo, la sinjorino, ankaŭ la domposedanto ricevos belajn juvelojn! Fine la virinoj interkonsentis, ke la sekvan tagon Eva kondukos sian amikon al certa arbara dometo... Nu, Eva kaj ŝia „amiko" alvenis, baldaŭ aliaj amikoj-kolegoj, kaj la vere sin kaŝintaj du rompŝtelistoj baldaŭ ricevis pli „sekuran azilon" en la policejo. La juna leŭtenantino ridete akceptis la plene merititajn gratulojn.

ORIGINALA POEZIO

Jiří Kořinek

Stumble inter ismoj

Se mi estus ĉiopova
kiel estas Dio mem,
kreus mi la mondon nova
sen la homa erarem'.

Sen kruelo kaj sen stulto
devus esti mia hom',
saĝa, nobla, kaj rezulto:
estus li model' de bon'.

Mi verŝajne vane penus
kontraŭ la dialektik',
tia homo ne konvenus
al la kosma krelogik'.

La agadon homan tuŝas
ja kun Dio eĉ satan',
kaj planadon nian fuŝas
per infera sia man'.

Kiam brul' senkulpajn murdis
kulpe de inkvizici',
ĉu la homa far' absurdis
laŭ la sankta vol' de Di'?

Kred' kristana aŭ alia,
aŭ sendia ies kred'
estis ofte mask' de fia
homa avideg' je pred'.

„Nur ni pravas" ĉu prediki
pretaj por nuklea bat',
kaj rankore malamiki
kontraŭ alikreda frat'?

„Ismon" ajne idealan
voras egoismo-verm',
kaj bonstaton ĝeneralan
celas: de ĉi verm' eksterm'.

Tiu ismo servon faros
la plej taŭgan por soci',
kiu ekspluaton baros,
sed al kre' stimulos ĝi.

Se l' homaro venki volas,
lernu ĝi el la pase':
paca vojo estas sola
ne gvidanta al pere'.



Dum tiu ĉi aŭtuno aperos ĉe Hungara Esperanto-Asocio grava libro: **Dek prelegoj de Kálmán Kalocsay**, *redaktita de Ada* Csiszár. *La volumo prezentos al la legantaro la elstaran figuron de la Esperanta kulturo kiel preleganton. La plimulto de la prelegoj temas pri literaturo, precipe pri la Esperanta poezio, problemoj de verstradukado ktp., sed aperos en la volumo ankaŭ lia ampleksa studo: „Pri la vortosistemo de Esperanto". Ĉisube ni prezentas specimene el la volumo lian eseon pri la rusa blinda esperantista poeto, V. Eroŝenko. Lia libro mendeblos ekde oktobro ĉe Hungara Esperanto-Asocio.*

Eroŝenko, la blinda mondmigrulo

Kálmán Kalocsay

Karaj samideanoj!

El la plumo de sovetaj litersturistoj (Rogov, Belorusov ktp.) nuntempe pluraj artikoloj okupiĝas pri certa mistera rusa esperantista verkisto, poeto: Vasilij *Eroŝenko.* Ĉi tiu nomo, ofte renkontebla en la taglibro de la granda ĉina verkisto *Lu Sin,* ne malmulte konfuzis la sovetajn esplorantojn de la ĉina literaturo. *Lu Sin* videble tre amis tiun „revolulon de kristalpura animo", kiu „kun vira animforto portis sian pezan sorton." Inter la 10 volumoj de liaj kolektitaj verkoj preskaŭ unu tuta volumo konsistas el rememoroj pri *Eroŝenko* kaj el tradukoj de ties verkoj, inter ili de la dramo „Rozkoloraj Nuboj". *La Lu-Sin*-a novelo „Anaskomedio", kiel *Rogov* montris, temas tiel same pri *Eroŝenko.* La komedio de la anasoj estas propre la tragedio de la ranidoj, kiujn *Eroŝenko* bredas, por aŭdi en Pekino almenaŭ ilian kvakadon anstataŭ la resopirata naturmuziko en Birmo. *Eroŝenko* bredas nome ankaŭ anasidojn, ĉar ili estas tiel dolĉe molaj kaj tiel agrable kvaketas en liaj manoj. Poste la anasidoj manĝas la ranidojn.

Legante la nomon de *Eroŝenko,* aperas en mia memoro la figuro de tiu blindulo-poeto. En 1923, en la *Nürnberga* kongreso, kun decidaj paŝoj suriris la podion tiu alta, rekta viro kun abundaj, helblondaj haroj, fermitaj palpebroj, melankolia rideto sur la iom pala vizaĝo. Li deklamis, kun tre sugestia voĉo, sian poemon „La antaŭdiro de la ciganino". La aŭdantaro estis surprizita kaj tute konkerita, tiel ke la juĝantaro, gvidata de Edmond *Privat,* donis al li la unuan premion de la plej bona Esperanta prononco. Verdire, tiu prononco ne estis tute modela: la konsonantoj ofte estis tro molaj, la akcentaj vokaloj ofte sonis tro mallonge kaj akrafrape, sed la artismo de la prezento kaj la emociokirla enhavo de la poemo estis nerezisteblaj. Jen la grandsukcesa poemo de *Eroŝenko:*

ANTAŬDIRO DE LA CIGANINO

Mia kara, mia bona,
Mia nobla belulin'!
Ciganino diras veron,
Ciganin' ne trompas vin.

Scias mi knabinajn revojn,
La sekretojn de la kor',
Scias mi pri homfeliĉo,
Scias mi pri amdolor'.

Kredas vi, ke la feliĉo
Estas via vera sort',
Kredas, ke belec' kaj amo
Akompanos vin ĝis mort'.

Kredas vi, ke ne ŝanĝiĝas
Vira amo sub la sun',
Kredas vi, ke la amikoj
Ne perfidas sub la lun'.

Kredas vi, sed mia kara,
Mia nobla belulin',
Kredu min, mi diros veron,
Ciganin' ne trompos vin.

Daŭra amo, daŭra ĝojo
Estas vana belesper':
En la mond' ŝanĝiĝas ĉio;
Ĉio pasas sur la ter'.

Pro l' amat', pro la amikoj
Venos plej malĝoja hor',
Kaj por ĉiam nur sopiro
Restos en la juna kor'.

Mia kara, mia bona,
Vin kompatas ciganin':
Plej fidataj vin perfidos,
Plej amataj trompos vin.

Mia kara, mia bona,
Kompatinda belulin'!
Ciganino vin kompatas,
Sed ne povas helpi vin.

Ne ekzistas ja sorĉado
Kontraŭ la fatala mort',
Ne ekzistas talismanoj
Kontraŭ malbenita sort'.

Sed memoru, ne forgesu,
Mia kara belulin',
Estas io en la mondo,
Kio ne perfidos vin.

Tio estas la ponardo,
Tio estas mortvenen';
Kiam ĉio vin perfidos,
Ili estos vera ben'.

Vi memoru, ne forgesu,
Mia nobla belulin',
En la venĝ' ponard' vin helpos,
Mortvenen' ne trompos vin.

Mia kara, mia bona,
Mia nobla belulin? !
Ciganino diras veron,
Ciganin' ne trompas vin.

En 1923 aperis en Ŝanhajo, libreto de *Eroŝenko:* ĜEMO DE UNU SOLECA ANIMO, kaj per tio ankaŭ finiĝis lia literatura kariero Esperanta*. La libreto entenas rakontojn kaj skizojn pri hina vivo kaj kvar poemojn de *Eroŝenko.* Eble ne estos seninterese sekvi la vojojn de tiu multvoja blinda esperantisto laŭ la indikoj lastatempe malkovritaj.

Vasilij Jakovleviĉ *Eroŝenko* (Jeroŝenko) naskiĝis en 1890, kiel tria filo de malriĉaj gepatroj, en la rusa vilaĝeto *Obuhovka, Kurska* Gubernio. Tie ŝajnas vivi ankoraŭ viglaj memoroj pri li, ĉar el liaj vagadoj li ne malofte revenis al sia naskonesto. La tiea instruistino, Vera *Ivanova Serdjukova,* ame flegas lian memoron, volas establi muzeon en lia iama legoĉambro. Oni volas eĉ nomi la tiean lernejon laŭ lia nomo.

Laŭ la tiea buŝtradicio, la infano Vasilij havis admirinde belajn ĉielbluajn okulojn, tiel ke oni donis al li la karesnomon Vasiljok (cejano). En sia kvina jaro li blindiĝis sekve de infekta malsano. Li estis tute blinda, nur en lia memoro restis la bluo de la ĉielo, flugantaj kolomboj, la vizaĝo de lia patrino.

Sed li ne rezignaciis je tio, ke lia blindeco lin malhelpu en la libera moviĝado: li iradis sola sur la kampoj, en la arbaro. Ofte li falis, batiĝis al la branĉoj, kontuzis sin pli mapli grave, sed iom post iom li akiris kvazaŭ sesan senson de orientiĝado, tiel ke lia irado estis tiel same kuraĝa kaj certa, kiel tiu de la vidantoj. Li eksentis ekzemple, ke antaŭ li troviĝas elstrečita vestsekiga ŝnuro kaj li transkliniĝis sub ĝi.

Naŭjara, li venis en *Moskvan* blindul-instituton por esti instruata pri skribo-lego-kalkulo. Al tiu lernejo ne ligis lin tre bonaj memoroj, kiel montriĝas el lia verketo „Paĝoj el mia lerneja vivo". Mi citas unun el tiuj paĝoj.

„Oni sendis min al *Moskvo* lerni ion en la blindullernejo.

La lernejo estis fermita de la tuta mondo, la lernanto rajtis nek eliri por siaj aferoj, nek iri eĉ la gepatrajn hejmojn dum libertempo. Ni ĉiam estis sub la kontrolo de la instruistoj. Ĉi tiuj instruis al ni, ke la tero estas granda, kaj multaj homoj ankoraŭ povas trovi lokon sur ĝi por vivi. Nia amiko, la dekunujara knabo *Lapin,* demandis:

Se la tero estas granda, kial do mia patro neniel povas havi eĉ malgrandan pecon da ĝi kaj ĉiam devas ĝin lui de grafo *Orlov?*

Tiam la instruisto punis lin pro la malsaĝa demando; en nia klaso ni povis meti al nia instruisto nur saĝajn demandojn.

Post kelka tempo la instruisto demandis al Lapin:

– Ĉu vi ankoraŭ ne komprenas, ke via demando estas malsaĝa demando?

Lapin ne povis ankoraŭ kompreni kaj li devis stari, ĝis li komprenis la malsaĝecon de la demando. Nur post duonhoro Lapin komprenis tion kaj povis sidiĝi.

Post la leciono mi demandis al *Lapin,* en kio konsistas la malsaĝeco de lia demando. Li diris, ke li ne scias. Mi redemandis:

– Sed vi diris ja, ke vi komprenas.

– Mi komprenis, ke estas malsaĝe stari kaj esti punita pro kia ajn demando – respondis *Lapin.*

Alifoje, la instruisto diris al ni, ke la homoj estas dividitaj en rasojn: en blankan, flavan, ruĝan, nigran ktp. La plej civilizita kaj plej progresema raso estas la blanka, la malplej civilizitaj estas la nigra kaj la ruĝa.

Lapin stariĝis kaj demandis:

– Ĉu ni estas la plej civilizitaj kaj progresemaj pro nia blanka koloro?

Alia knabo stariĝis kaj demandis:

– Kiam somere oni nigriĝas pro la suno, ĉu oni ankaŭ malciviliziĝas pro tio?

La instruisto diris, ke ambaŭ demandoj estas malsaĝaj; tial *Lapin* kaj la alia knabo devis stari, ĝis ili komprenis sian malsaĝecon."

En tiu blindullernejo, inter saĝaj kaj malsaĝaj demandoj, *Eroŝenko* komencis verki poemojn kaj fabelojn, lernis ankaŭ ludi violonon kaj gitaron. Li havis absolutan aŭdon

*Intertempe evidentiĝis, ke la Esperanta literatura aktivado de Eroŝenko daŭris plu. Liaj verkoj aperis dum la lastaj jaroj en Japanio, sub la editorado de Mine Yositaka.

kaj tre agrablan voĉon. Granda estis lia improviza kapablo: fabeli li povis preskaŭ senfine. Li kutimis tiaokaze preni libron kaj foliumi dum la fabelado: la blindaj knaboj, aŭdante la susureton de la paĝoj foliumataj, opiniis, ke li legas la fabelojn.

Forlasinte la blindullernejon, li fariĝis restoracia muzikisto. Sed tio ne kontentigis lin, li deziris lerni pli, kaj tre doloris al li, ke tio montriĝis ne ebla. Li konatiĝis kun instruistino de fremdaj lingvoj kaj plendis al tiu pri sia sorto, siaj sopiroj. Ŝi konsilis al li, lerni la anglan lingvon kaj iri *Londonon,* kie tiam plej elstara estis la eduko de blinduloj per novaj, modernaj metodoj.

Eroŝenko do komencis serĉi lernolibron de angla lingvo por blinduloj. Sed en la tuta Rusujo li ne povis tian ricevi. Malespere li lamentis pri tio al la instruistino en la ĉeesto de ties 15-jara nevino, kiu estis esperantistino. La bonkora knabino tre kompatis la blindan knabon kaj tuj proponis al li, ke ŝi instruos al li Esperanton.

Komenciĝis do la lecionoj. La knabino surprizite kaj pli kaj pli admire vidis, ke ŝia disĉiplo havas neimageblan memorkapablon. Kiel seka spongo la akvon, li suĉis en sin la lingvon: sufiĉis al li unufoje aŭdi regulon, vorton, esprimon por ke li neniam plu tiujn forgesu. En du monatoj li lernis la lingvon perfekte kaj parolis ĝin pli flue ol lia instruistineto.

Kaj nun malfermiĝis antaŭ li la mondo. Li plektis viglan korespondadon kun anglaj esperantistoj. Kaj en 1912 li ekvojaĝis per sia ŝparita monsumeto al *Londono.* Tiutempe tia vojaĝo de blindulo estis vera sensacio, la rusa revuo *Ĉirkaŭ la mondo* dediĉis al ĝi longan artikolon.

En *Londono, Eroŝenko,* ĉiam helpate de siaj esperantistaj korespondantoj, lernas la anglan lingvon kun tia sama mirakla rapideco kiel Esperanton, studas en instituto por blinduloj, vizitas blindul-kolegiojn kaj bibliotekojn, akiras abundajn konojn multeflankajn, poluras sian intelekton.

Komence de 1914 li revenos en Ruslandon, sed jam en aprilo de ĉi tiu jaro li vojaĝas, komsiite de la Rusa Esperanto-Federacio, al Japanujo.

Kun kia celo REF sendis *Eroŝenkon* al la Oriento, tion ni ne scias. Ni scias nur, ke en Japanujo li studis kuracmasaĝon laŭ japana maniero en blindula lernejo de *Tokio,* kaj tie li fervore propagandis Esperanton inter la blindaj studentoj. Post du jaroj li donis denove pruvon pri sia mirinda moviĝemo: li vojaĝis al *Siamo* kaj fondis tie blindulan lernejon. Poste li daŭrigis sian migradon tra la sudo de Azio, en la lasta jaro de la unua mondmilito li estis en Hindujo, kaj de tie li volis hejmenveni tra Afganistano, sed oni arestis lin kiel ruĝan agenton, transportis lin al *Vladivostok* por tie transdoni lin al la blanka tribunalo. Sed li sukcesis eskapi el la ŝipo. Dumvoje li akiris amikojn, kaj tiuj donis al li ĉinan veston, artefaritan harligon, farbis lian vizaĝon flava, kaj miksis lin inter la ĉinajn doklaboristojn, kiuj portadis ŝipŝarĝon al la haveno. Tiel li forlasis la ŝipon, kun ŝarĝo sur la dorso, sur la lignotabulo servanta kiel ponto.

Kaj li sukcesis atingi ne nur la havenon, sed post la longa migrado ankaŭ la ĉinan limon. La ĉinaj gazetoj siatempe raportis pri tio, kiel pri eksterordinara heroaĵo.

En la somero de 1919 li venis tra *Ŝanhajo* denove Japanujon. Bone posedante la japanan lingvon, li verkis tiulingve multajn rakontojn por geknaboj, kaj akiris por si konsiderindan famon kiel verkisto.

En 1921, pro partopreno en la demonstracio de la unua de majo, li estis arestita, kaj baldaŭ ricevis elpel-ordonon. Tiam li reiris Ĉinion, kaj en 1922 prelegis lekciojn pri la rusa literaturo kaj aliaj temoj en la *Pekina* universitato kaj en edukista kolegio por virinoj.

Tiom li interamikiĝis kun *Lu Sin,* kiu, kiel ni jam diris, tre amis kaj respektis ĉi tiun multevagan blindulon. Ankaŭ la muzika talento de *Eroŝenko* plezurigis lin, volonte li aŭskultis lian artan violonludon kaj lian kantadon kun la propra gitar-akompano. La baladon de Stepan *Razin,* aŭditan en la prezento de *Eroŝenko, Lu Sin* ankaŭ tradukis en la ĉinan lingvon.

En 1923 li revenis al Eŭropo, tiam li vizitis la *Nürnbergan* kongreson. Poste li funkciis en *Moskvo* kiel blindulinstruisto kaj kiel interpretisto (li parolis pli-malpli 10 lingvojn). Antaŭ la dua mondmilito li estis kelkatempe direktoro de infanĝardeno por blinduletoj. En la kvardekaj jaroj li denove restadis en Moskvo.

En 1952, jam malsane, li reiris al sia naskiĝvilaĝo *Obuhovka.* Ne konsiderante sian malsanon, fortostreĉe li laboris pri sia lasta verko, kiun li nepre volis fini antaŭ sia morto. Li ankaŭ finis ĝin, sed ĝis nun oni ne sukcesis ĝin trovi. Oni scias nur tiom, ke li sendis la manuskripton al *Moskvo,* al iu el siaj korespondantoj.

Eĉ tion oni ne scias, kialingve la verko estis skribita. La konataj verkoj de *Eroŝenko* estas skribitaj angle, japane aŭ Esperante, ruse li verkis maksimume tiun lastan misteran verkon.

Ankaŭ tion oni ne scias, el kia lingvo tradukis *Lu Sin* liajn verkojn en la ĉinan. Sed tiuj noveloj kaj fabeloj nun jam estas gardataj en la *Lu Sin*-a verkaro. Ankaŭ en Japanujo oni reeldonis la rakontojn de *Eroŝenko* en 1934.

Eroŝenko, kiu ŝajnis tiel serena kaj egalanima, estis tamen de melankolia, eĉ eble de iom taŭzita animo. Nur unu poemo restis post li, kiu elspiras esperon kaj vivoĝojon kaj ankaŭ tion oni devas rekonstrui tra la *Lu Sin*-a teksto. Jen:

PRINTEMPO

Vi povas revi, devas revi
sen perdo de espero,
printemp' ne estas ekstermebla,
printempo estas vero.

Diskreskos ĉie ruĝaj floroj,
kaj per la sunovarmo
varmiĝos ĉies frosta korpo,
sekiĝos ĉies larmo.

Frapetos ĝia vent' fenestre,
riverglacio krevos
pli kaj pli alten, ĝis zenito
la venka sun' sin levos.

Li mortis en 1952, kaj ripozas en la tombejo de sia hejmvilaĝo

D-ro Otto Thur kaj Gyula Gyerkó

Por protekti la akvojn– Modernaj klorgas-enigiloj

Akvoprovizejoj havas ĉiam grandajn zorgojn pri la daŭre bona kvalito de la trinkakvo kaj por kontraŭbatali eventualan bakterian infektadon de la akvo. La socia graveco de tiuj taskoj estas evidenta, sed la necesa malinfektado de la akvo neniel estas simpla afero, ĉar tio bezonas altnivelan teknikon. Lastatempe tiu tasko iĝis ankaŭ por la Hungarlanda hidrologio pli kaj pli malfacila; i.a. pro la komplikaĵoj en la priservado kaj riparado de la deko da diverstipaj eksterlandaj kloriziloj, kiuj eĉ ne kontentigas la kreskantajn teknikajn postulojn. Kelkaj tipoj, kies fabrikadon oni ĉesigis, tute ne estas reŝanĝeblaj je novaj, tial necesas trovi anstataŭantojn.

La hungara hidrologio serĉis do vere modernan tipon por fabrikigi klorizilon, kiu estos vasta kaj favore uzebla inter niaj cirkonstancoj. El inter la tutmonde plej altnivelaj aparatoj oni fine elektis la klorgas-enigilon ADVANCE (pr. advans), kiun disvolvis kaj produktas la Usona firmao Capital Controls Company (CAPCO). La decidon instigis ankaŭ la bonegaj spertoj akiritaj per la jam utiligataj tiaj aparatoj, kiuj funkcias per klorgaso, anstataŭ la malstabila, varie densa natria hipoklorito.

LA AVANTAĜOJ DE TIUJ APARATOJ:

- eta lokbezono, do ŝparo de konstruado,
- facila manipuleblo,
- preciza dozado,
- granda funkcia sekureco,
- tre vasta sortimento laŭ kapacito,
- eminenta materialo,
- ebloj de kompletigo – konstrukesto-principo
- elŝaltiĝo de gaskondukiloj pro premaltiĝo,
- kontinua funkciado certigata – aŭtomata botelŝanĝo,
- ebloj por tele-regado kaj por samtempe plurloke klorizado.

La Danub-regiona Entrepreno pri Akvoprovizo kaj -Mastrumo en urbo Vác, jam plenumis la priservadon de la diverstipaj kloriziloj, tial en 1977 ĝi kontraktis kun CAPCO – laŭ komisio de la Nacia Hidrologia Oficejo – por vendi kaj servi la ADVANCE-aparatojn. Ili montriĝis en la Hungarlanda praktiko tiel taŭgaj, ke por tutlande disvastigi ilin, la Entrepreno faris baldaŭ kunlaboran kontrakton kun la Usona firmao kaj ricevis la rajton mem fabriki la klorgas-enigilojn ADVANCE. Temas pri la enlande preferataj permanaj kaj duonaŭtomataj aparatoj de tipo 200. La kunlabore produktitajn aparatojn la hungara firmao NIKEX rajtas eksporti al certaj landoj, i.a. el la Eŭropaj landoj de la Konsilio de Ekonomia Interhelpo.

Ekde 1980 la Entrepreno do serie fabrikas la 18 modelojn de la aparatoj ADVANCE 200 kaj iliajn multajn variantojn. Pli ol mil aparatoj funkcias jam en Hungario: nia fabrikado kapablas kontentigi la enlandan bezonon. Komenciĝis eĉ la eksportado, ankaŭ pro la bonaj rezultoj de la eksterlande – precipe en Ĉeĥoslovakio kaj GDR – establitaj referencaj klorizejoj de la Entrepreno.

La ĉefaj karakterizaĵoj de la aparatoj. La klorgas-enigiloj de tipo ADVANCE 200 funkcias per la nuntempe plej moderna kaj sekura *pervakua dozado*

Klorgas-enigilo ADVANCE 201. muntita sur gasbotelo.



en tre perfekta teknika maniero. La kompleta baza aparato (tipo 201) konsistas el *vakuo-regilo, rotametra regelemento, ejektoro* (elŝutilo), kiu estas enigata en la funkciigantan akvocirkuladon, kaj interliganta polietilena kondukilo. Ĉiuj tipoj estas fabrikataj laŭ la *sama principo* (fig.1.).

La ejektoron trafluanta akvo estigas vakuon, kiu malfermas la retroferman valvon de la ejektoro. Tiel estiĝas vakuo ankaŭ en la klorkondukilo, pro kio malfermiĝas la sekuriga valvo de la vakuo-regilo, kaj la gaso ekfluas tra la rotametro al la ejektoro. La volumenon de la klorgas-dozo oni fiksas per la nadla-valvo super la rotametro. La klorgaso en la ejektoro miksiĝas kun akvo, tiu klorizita akvo kondukiĝas eksteren, en la malinfektan basenon. Kiam la akvofluo ĉesas, ĉesas ankaŭ la klordozado.

La nepra *funkcisekureco* sekvas el la funkcia principo. Se la vakua kondukilo difektiĝas aŭ alia liko prezentiĝas, la sekuriga valvo de la vakuo-regilo tuj fermas, kaj la gasfluo ĉesas.

De la plej simpla ĝis la komplikajn taskojn plenumantaj, la tuta aparataro baziĝas sur bone pripensita *konstrukesto-principo.* Per ŝanĝo de nur kelkaj elementoj ili taŭgas por plenumi sekure la klorizadon, laŭdezire per dozoj inter 0,6 g/h kaj 10 kg/h. Ĝia strukturo ebligas ankaŭ diversajn kompletigojn.

La rotametro klare indikas la volumenon de la dozita klorgaso, kiun eblas laŭdezire ĝustigi per la surmuntita reguliga valvo. Por pli preciza observado de la indikoj, la klorgas-enigilon laŭbezone eblas provizi per *diversskalaj rotametro-tuboj.* Estas ankaŭ ebleco la rotametron kun sia reguliga valvo instali aparte, eĉ 10-20 metrojn for de la aparato, ekzemple en la regadejo de la akvoprovizejo, por *teledirektado.*

La malpleniĝon de la klorgasbotelo indikante la verda signo sur la aparata tabulo iĝas ruĝa. Laŭ deziro eblas almunti *mikroŝaltilon anoncantan la klormankon* per lumo aŭ sono en la regadejo.

Estas tre granda avantaĝo de la aparataro, ke unu vakuo-regilo povas *funkciigi plurajn ejektorojn* per diversaj dozoj. Por plurloke enigi la klorgason, necesas ĉiuloke aparta ejektoro kaj rotametra regilo.

Se estas enigenda ĉiuhore pli ol 2 kg da kloro, kio eventuale ne eblas el unu botelo, oni uzas *kolektan tubon* disde la bezonataj pluraj klorgasboteloj al la aparato. Se la dozoj estas grandaj, oni prefere uzas *klorbarelojn* por eviti oftajn ŝanĝojn de multaj klorboteloj. En malgrandaj stacioj sen konstanta servado, oni prefere uzu tian aparaton, kiu havas *aŭtomatan komutilon;* tiu aŭtomate ŝaltas la sekvan servopretan botelon (botelaron, barelon) al la aparato, kiam la antaŭa botelo malpleniĝis (fig.2.).

Konsiderante la supre menciitajn, la aro de la klorgas-enigiloj ADVANCE 200 havas la sekvajn tipovariantojn:

Maksimuma kapacito g/h	BAZAJ MODELOJ (rotametro kaj doziga valvo sur la vakuo-regilo)	TELEDIREKTATAJ modeloj kapablaj dozi en unu aŭ pluraj lokoj	TELEDIREKTATAJ modeloj kun AŬTOMATA KOMUTILO
Sur klorgasbotelo munteblaj			
2000 g/h	tipo 201.	281.	205.
Sur muro, sur klorgaskolekta tubo munteblaj			
4000 g/h	202.	283.	2025.
10000 g/h	275.	285.	2755.
Sur klorgasbarelo munteblaj			
2000 g/h	269.	282.	2695.
4000 g/h	270.	284.	2705.
10000 g/h	271.	286.	2715.

Utiligo de la klorgas-enigiloj ADVANCE ĉe poluakvo-purigo. Dum la pasintaj jaroj la klorgas-enigiloj ADVANCE disvastiĝis ankaŭ ĉe la malinfektejoj de la poluakvoj. Unuavice ĉirkaŭ Balatono – kie elstare gravas protekti la medion – poluakvo-purigejoj ekuzis tiujn klorizilojn.

En la poluakvo-purigejoj oni nuntempe malinfektas per natria hipoklorito (NaOCl). Tiu metodo bezonas tre simplajn rimedojn, tamen tiel ne eblas plenumi la pli kaj pli severajn preskribojn de la medioprotekto. El la freŝa NaOCl la utiligebla kloro estas 92,5%, kaj pro malstabileco de la komponaĵo tiu proporcio rapide malkreskas. Dum klorizado nur per aparta ekzameno eblus konstati la efektivan konsiston, do la dozojn apenaŭ eblus adapti al la ŝanĝiĝanta poluakvo.

Alia malavantaĝo de la natria hipoklorito estas, ke pro ĝia kemia efiko nur korod-rezistaj materialoj estas aplikeblaj en la klorizilo, krome ĉe la manipulado, ankaŭ de la kemiaĵo, oni devas obei striktajn preskribojn pri sekureco. Karbonataj restaĵoj en la kondukilo, eĉ ŝtopiĝoj necesigas ofte purigojn kaj



Fig. 1.

riparojn, kio forte malhelpas la kontinuan funkciadon.

En la poluakvo-purigejoj la klorizilojn de tipo ADVANCE eblas funkciigi kaj per kondukita akvo, kaj per purigita poluakvo – ambaŭ havas bonajn kaj malbonajn flankojn. Uzi kondukitan akvon ŝajnas facile, ĉar la akvo bezonata de la ejektoro estas utiligebla sen premon altiga pumpilo. Sed danĝero minacas, kiam pro teknika difekto ĉesas la premo en la ejektoro: la akvoduktaro eventuale ensuĉas la poluakvon tra la klorakva enigilo, kaj la trinkakvoj infektiĝas. Tial la sanitaraj instancoj nur tiam permesas utiligi la akvoduktaron, se la provizan dukton oni interrompas, kaj la ejektoro ricevas la akvon el rezervujo, helpe de premaltiga pumpilo (fig.3.). Plua malavantaĝo estas, ke multekosta trinkakvo pliigas tiamaniere la poluakvojn.

Se purigita poluakvo funkciigas la ejektoron, la supraj malavantaĝoj forestas, sed oni devas zorge filtri la poluakvon. Ofte restas en ĝi fibraĵoj, ŝvebaĵoj, kiuj ŝtopas la kelkmilimetran ajuton de la ejektoro kaj sekve la klorizado ĉesas. Pumpilo kompreneble same necesas; preferindas meti ĝin en la malinfektan rezervujon.

La regmaniero de la klorgasdozado dependas de la malinfektaj farendoj:

Permana regado: la manipulisto fiksas la klordozon, konsiderante la bezonon kaj volumenon de la traktenda poluakvo. Tion poste modifi nur tiam estos necese, se ŝanĝiĝas la volumeno aŭ kvalito de la poluakvo. Tiu maniero taŭgas ĉiam, kiam la klorbezono, la volumeno kaj kvalito de la traktenda poluakvo restas preskaŭ la sama; ankaŭ tiukaze, se pri la ŝanĝiĝoj venos antaŭe signaloj, laŭ kiuj la konstante servanta personaro modifos la dozon.

Start-ŝtop-regado: tiu estas laŭkvanta regado, uzebla kiam pumpiloj levas la poluakvon en la traktadejon. Por tiu sistemo oni uzas la saman nombron da pumpiloj kaj ejektoroj, en kiuj estas enmuntita magnetvalvo. Se la volumeno de la poluakvo kreskas, plua pumpilo eklaboras kaj ŝaltas la alkonektitan magnetvalvon, sekve la ejektoro ekfunkcias. Tiamaniere la klordozado kreskas proporcie al la laborantaj pumpiloj.

Kvanteca regado: preferindas, kie dumtage la volumeno de la poluakvo forte ŝanĝiĝas, sed la kvalito restas preskaŭ la sama. La instalaĵo aŭtomate ĝustigas la klordozon laŭ elektra signalo de volumenmetro, konforme al la alfluo de la poluakvo. La klordozon por la poluakva volumen-unuo fiksas la manipulisto, kaj ties aŭtomata ĝustigo gardas daŭre la rilaton inter la poluakvo kaj kloro. Nun jam estas disvolvita la akcesoraĵo, kiun eblas konekti al la permana kaj duon-aŭtomata klorgas-enigiloj ADVANCE por tiu ĉi regmaniero.

Aŭtomata regado laŭ klor-restaĵo: plej bone uzeblas kie la volumeno de la poluakvo estas preskaŭ konstanta, sed la kvalito forte ŝanĝiĝas. ankaŭ se oni severe limigis la klor-restaĵon de la poluakvo fluigata en akceptujon. Laŭ tiu metodo la instalaĵo prenas kontinue provaĵon el la klorizita poluakvo, analizas ĝin, kaj la rezulton komparas kun la preskribita valoro de la klor-restaĵo. Pri la diferenco ĝi donas signalon al la aŭtomata klorgasvalvo por pli- aŭ malpliigi la klordozadon, gardante la difinitan nivelon de la restinta kloro.

La aŭtomata regado laŭ klor-restaĵo bezonas ankoraŭ importitan instalaĵon. Sekve de la disvolvaj agadoj, per kunlaboro estos fabrikata tia aŭtomato, kiun eblos tiucele konekti al la permana kaj duonaŭtomata klorgas-enigiloj ADVANCE.

Kombine regata aŭtomata klorizilo: klorizas aŭtomate, rekt-proporcie laŭ volumeno kaj klorbezono de la poluakvo (fig.4.).

Ĉi estas uzinda kie la volumeno kaj klorbezono de la poluakvo forte ŝanĝiĝas kun la tempo, kaj severaj preskriboj limigas la akceptujon. La instalaĵo regaŝ la fiksitan dozadon konforme al la poluakvovolumeno, mezurita kaj elektre signalita de la volumenmetro, tamen tion modifas la signaloj de la analizilo, kiu atentas la permeseblan klor-restaĵon en la klorizita akvo.

Tiu regmaniero ne estas sen problemoj koncerne la malinfektadon de la poluakvoj: la signalo de la



Aŭtomato reganta proporcie al la akvovolumeno, muntita sur klorgas-enigilo ADVANCE 201.



Fig. 2.

Surbotele muntita klorizilo kun aŭtomata komutilo (tipo 205)

analizilo ĉ. 30 minutojn postrestas la signalon de la volumenmetro, ĉar tiu ĉi mezuras antaŭ la malinfekta baseno, dume la analizilo observas ĉe la basenfino, kiun la poluakvo atingas nur post ĉ. 30 minutoj.

Pluaj teknikaj adaptebloj de la klorgas-enigiloj ADVANCE 200. Specialaj taskoj de klorizadoj igis necese disvolvi teknikon de adaptebloj, resp. krei kompletigajn ilojn. Tiucele la Entrepreno sukcese disvolvis – parte pere de enlandaj kunlaborantoj – *plurajn specialajn ilojn,* kiuj konvene *ampleksigas la uzeblojn* de siaj aparatoj.

Por klorizi okaze de eksterordinara danĝero, la Entrepreno disvolvis *moveblan varianton* de la klorizilo. Person-aŭto rapide povas treni ĝin surloken, kie la eksterordinara infektado okazis (ekzemple pro rompo de tubo). La malinfektado estas rapide farebla per natria hipoklorito aŭ klorgaso. La instalaĵo havas premaltigan pumpilon kaj propran benzinmotoran generatoron. Krom la kutimaj hidrologiaj aplikadoj – malinfektado sur vandoj de kondukiloj, basenoj kaj rezervujoj, en ĉirkaŭaĵoj ĉe putoj – tiu movebla instalaĵo estas utiligebla en industrioj de viandaĵoj, konservaĵoj, fridaĵoj por malinfekti laborejojn, magazinojn, ties murojn, plankojn, instalaĵojn.

Se la uzino ne havas tiucele konvenan ĉambron, multe da konstruado estas ŝparebla pere de la izolita, kun hejtado, lumigo kaj ventolilo ekipita, prefabrikita plastika klorizo-niĉo. Ĝi estas tre bone uzebla ankaŭ preter longaj, regionaj akvoduktoj por plenumi interloke klorizadon.

Ĉe malgrandaj poluakvo-ellasiloj, kies taga volumeno ne superas 5-10 m³, ne montriĝis konvene uzi ADVANCE klorizilojn pro la relative granda bezono de kondukita akvo. Tiucele oni disvolvis *intervalan klorizilon:* ĝin horloĝ-mekanismo funkciigas dum difinitaj mallongaj intervaloj kun grandaj dozoj. Tiel la funkciiga akvo restas minimuma.

Malklorizi la troklorizitan akvon en purigejoj kaj precize fiksi la klornivelon: tion servas unuavice la *sulfurdioksid-dozilo* ADVANCE 200. Krom tio ĝi tre bone taŭgas por sulfuri kaj konservi vinon en vinmastrumejoj.

La *prekonstruitaj kloriz-blokoj* provizitaj per klorgasdoziloj ADVANCE 200 produktiĝas por laŭdeziraj klorgasdozado kun elektraj aŭtomato kaj alarmilo, ankaŭ kun permana regado. Ties avantaĝoj estas la kompleta livero kun minimuma surloka muntado, simpla manipulado sen specialaj konoj. La aŭtomatan varianton oni facile kontrolas el regadejo aŭ dispositejo; la instalaĵon oni prizorgas, riparas, modifas sen perturbo de la funkcianta duktaro; la sekureco pri vivo kaj havaĵo estas maksimuma.

Kunlabore kun Tungsram A.S. estis disvolvita la *akvovolumen-proporcie reganta aŭtomato* de tipo Mü 373. Konektite al klorgas-enigiloj ADVANCE 200, ĝi aŭtomate disponas pri la proporciaj klordozoj. Tio ebligas al la posedantoj de tiuj enigiloj kompletigi kaj aŭtomatizi sian malinfektan teknologion.

La klorizilojn kaj ties kompletigajn ekipaĵojn fabrikitajn de la Entrepreno eksportas NIKEX Pez-



Fig. 3.



Fig. 4.

industria Entrepreno pri Ekstera Komerco (H-1016 Budapest, Mészáros u. 48-54.).

La Entrepreno akceptas taskojn por *projekti kaj konstrui kompleksajn klorizadojn* por akvoprovizaj, poluakvopurigaj kaj ceteraj instalaĵoj ĉe trinkakvoproduktaj, banejaj, industriaj, agrikultura kaj sanitaraj institucioj laŭ la lokaj bezonoj kaj cirkonstancoj, kiel eble plej ekonomie.

Kune kun NIKEX la Entrepreno ankaŭ *eksterlande* akceptas tiujn ĉi taskojn, krome instruadon de manipulistoj, muntadojn de aparatoj, establi ties priservejojn surloke, ankaŭ ĉiaspecan teknikan kaj ekonomian konsultadon pri klorizado.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

recenzoj - recenzoj - recenzoj

Birdoj sur dratbarilo

Edwin de Kock: Japaneskoj. Poemaro originale verkita en Esperanto. Aŭtora eldono, 1982. 114 p. 19 cm. Prezo: 12,- ned.gld.

Neniu dubas, ke nia literaturo senĉese riĉiĝas. Tiu fenomeno estas pruvebla unuavice nek per la nombro de la paĝoj, nek per la laŭmetra longo de la libroŝtopitaj bretoj, sed ĉefe per la fortiĝo de la dutrajteco: ĝi aspiras konkeri kiel eble plej vastan kampon kaj samtempe ellabori kiel eble plej funde la opajn, strikte difinitajn kampopartojn. Tiel same, kiel okazas ĉe *Japaneskoj.*

Ekzistas iu denaska problemo de la Esperanto-literaturo: ĉu ĝi rajtas sorbi nur la internacie komunan parton de la naciaj literaturoj aŭ ilian tuton. La libreto de Edwin de Kock estas praktika respondo pri tiu demando. Kune kun ĉiuj siaj virtoj kaj malvirtoj.

Nia literaturo velas inter Karibda kaj Scila de la menciita demandoduopo. Ĝi plenumas iasence pacan sed konkeran „militiron". Ĝi devas perŝviti ĉiujn kaptaĵojn kaj perlabori ilian enplantadon. Tiu tre nobla strebado por akiri ĉion postulas longdaŭran kaj fortostreĉan laboron de talentaj verkistoj. Edwin de Kock ne timas la defion.

Tamen, kion celas tiu ĉi „militiro"? Akiri kaptaĵe – en la plej nobla senco – kaj esperantigi neelradikigeble enhavon kaj formojn, rimedojn. Ni analizu la poemaron laŭ tiuj vidpunktoj!

Mi estas kaj estos eterna admiranto de la majstro de miniaturaĵoj, poemobonsajoj. Fariĝis nekontesteble parto de mia vivo tiu ĉi lia tankao:

Sur propra mano
rigardu: papilio
jam flugiltrema,
ekflirtonta. Rapide
trapinglu, poezio!

Tiu ĉi poezia konfeso povos difini poetan sintenon ankoraŭ por multaj poeto-generacioj. Ĝi atentigas pri la verkista devo: honesti. Honesti al la vera realaĵo kaj honesti al nia propra memo. Por mi estis grava seniluziiĝo legi de la sama aŭtoro versojn, kiuj pruvas tute la malon. La poeto neniam forlasis sian kontinenton Afrikon, tamen – verŝajne laŭ gazetartikoloj aŭ rakontoj de iuj – li kuraĝas juĝi, verdikti pri la realo de iuj landoj, kie li spertis neniam en sia vivo ion rekte, persone. Nun mi ne intencas pli profunde eniri la temon, mi tute ne volas ideologii, mi mencias nur unusolan aferon: la baza devo de ĉiuj espe-

rantistoj estas helpi unu la alian en nia komuna, grava laboro por Esperanto. Sed la aluditaj versoj efikas tute male.

Revenante al artismaj temoj, ni povas konstati, ke nia Esperanto plene taŭgas akcepti preskaŭ ĉiujn formojn de versado (eble krom la grekaj). Edwin de Kock faris – krom la japanoj, nature – plej multe por hejmigi en Esperanto la japanajn formojn, servante tiel vastigi la limojn de la poezio. Kie ekzistas tiuj limoj? Ene de tiu demando eble pleje gravas: kie troviĝas la fontoj? Fontoj en du sencoj: socie kaj formale. Socie nepre ĉe la popolkantoj (praforme duversaj), kaj ĉe la poetoj nekonataj kaj konataj, kiuj verkas ilin. Laŭ mia supozo la japanaj utaoj, reutaoj (eble eĉ la longutaoj), hajkoj kaj tankaoj estis vaste, preskaŭ tutpopole praktikataj kaj iusence proksimas al la popolkantoj aŭ al la popolaj preĝoj.

Do la fontoj por Esperanto identas kun tiuj de ĉiuj naciaj kulturoj. Formale kie troviĝas tiuj fontoj? Kiom estas la plej malgranda amplekso de iu poemo? Ĉu unusola vorto povas esti poemo? Ĉu eble nur du aŭ tri, ktp? Mi opinias, ke neniu pensas serioze, ke per minimuma nombro de vortoj eblas strikte difini, kiam naskiĝas poemo. Ŝajne tiam, se ĝi kapablas kompletigi la vortojn kaj poemigi eĉ unusolan vorton. Se oni vidas rozon, kaj diras: rozo – tio ne estas poemo, sed kiam oni la unuan fojon diris al knabino: rozo – tio estis jam poemo. Tamen por verki ne-pormomentan poemon, oni devas fiksi la rilaton al la realaĵo per lingvaj rimedoj.

Kial mi diris ĉion ĉi? Simple por almontri gravan trajton de utao, hajko kaj tankao. Ni imagu bukedon (de floroj, ideoj), kiu estas kunrubandita. En tiuj japaneskaĵoj ni vidas nur la rubandan maŝon kaj ĉiu povas libere alimagi sian propran bukedon. Sekve ili fariĝos poemoj en la kunlaboro de verkisto kaj leganto (plie ol kaze de aliaj poemoj):

Morussporado.
Ho aŭtunadiaŭa
fruktodonado!
(Hajko)

Aŭ jen alia:

En ĉi mateno
vrake kontraŭrifiĝas
songokareno.
(Marborda vekiĝo)

Sed kiom ŝanĝiĝas la bildo:

En Ekbatano
ĉefbankisto fro Babel.
Kiu vi estis,
negocante kun Kuraŝ,
Itti-Marduk-balatu?
(Identeco)

La povran leganton rajte ĝenas tia amasigo de etnonimoj eĉ se mitonimoj. Li komencas solvi la enigmon: Ekbatano = la meda ĉefurbo, fro (neologisme) = disde, ekde, for de, Kuraŝ (PIV?) = la unua persa imperiestro, Itti-Marduk-balatu = ? (ĉu la menciita ĉefbankisto?) Ŝajnas, ke tiu ĝenro nuntempe ankoraŭ ne povos enradikiĝi en Esperanto.

Ĉe Kato Zakro
trans tridek kvin jarcentoj
la font' ankoraŭ.
Ŝtuparo senpieda.
Lazur' marĝema. Ventoj.
(Minoa cisterno)

Kato Zakro estas la ruinoj ĉe la orienta pinto de Kreto. Sed marĝema = ?, ĉu nura tajperaro? La poeto majstre plenigas per poezio eĉ sekajn gramatikaĵojn (trans - ankoraŭ; laŭgrada mallongigo, senornamigo, nudigo de la frazoj kontraste al la plenbriligo de la tropo). Samtempe mi vidas en tiu tankao kunfandiĝon de elementoj de hajkismo kaj utaismo.

Kaj jen, ni alvenis al nova trajto de la poeto: li kuraĝas eksperimenti. Li proksimigas – malproksimigas, analizas – sintezas la ĵus konkeritajn formojn. Li eĉ vastigas la kadrojn kaj ĵongle kunligas la okcidentan akcentnombran kaj la orientan silabnombran formojn:

La sombra tajdo nun ankaŭ sin
fortrenis.
Fine konstati, ke ĉirkaŭ vi malgraŭe
somero jam revenis.

Sed stari sola, ie sur voj' –
vivmeze –
post lasta mejlo kun Beatrice via
kaj amiko Pavese.

Brilspure alten, post figuro lucerna
tra la tenebor. Ho jaroj, ho iama
kunulino eterna!
(Al Carlo Minnaja)

En tankaa formo la sama:

La sombra tajdo
nun ankaŭ ŝin fortrenis.
Fine konstati,
ke ĉirkaŭ vi malgraŭe
somero jam revenis.

Jen, defio por la poetoj: kunfandi poemformojn de malproksimaj kulturoj. Ni haltu por momento ĉe la verstekniko! La okcidenta formo de verso konsistas el dek du silaboj, kun cezuro post la kvina silabo. La tria, mallonga verso sepsilaba estas struktura sinonimo de la sepsilaba dua duono de la antaŭaj versoj. La struktura ripetiĝo fortigas la rimefikon kaj kunligas la tutan strofon; pli precize „strukturaj rimoj" ekzistas inter ĉiuj tri versoj de la strofo, sed inter la ekstremaj versoj aperas ankaŭ vera „morfo-rimo". Tiu rimarangĝo unuigas la efikon de la grekaj kaj de la kutimaj rimantaj akcentonombraj poemoj. El tio sekvas ŝajne la regulo, ke la dua sepsilaba duono de la dua verso kaj la tria verso strukture devas identi (alie la dezirata „struktura rimo" ne ekzistas). Sed ni revenu post la ĵusdiritaj al la longaj dek du-silabaj versoj. La antaŭcezuraj kvin silaboj montras la regulojn de jambo, la lasta piedo estas trokeo. Inter ili troviĝas kvin transiraj silaboj, kiuj realigas transiron el jamboj en trokeon. La demando estas sekve: kiel ĉio ĉi realiĝas? Por almontri la parencecon kun la finaĵo de heksametro ni menciu nur, ke en la greka kaj hungara lingvoj, kiuj senmanke kapablas produkti tiun formon, estas plene permesate, ke la lasta piedo spondea fariĝu trokea. Li uzas plurajn solvojn: en la unua strofo ambaŭverse li uzas pentabrakojn, en la dua aperas jam tribrakoj kun trokeoj, en la tria jen pirikio kun daktilo (la versofinaĵo tiel plene similas al tiu de heksametroj), respektive jambo kaj tribrako. Ni spertas sekve, ke la postcezura silabo estas ĉiam mallonga, tiel la sinsekvo de du mallongaj silaboj fortigas la cezuron. Ni vidu la praktikajn solvojn: 1./ post unu aŭ tri senakcentaj silaboj transiri tuj al trokeoj, 2./ post du senakcentaj uzi spondeon, 3./ pentabrako. La ĉi-lasta tamen ne estas verŝajne vera solvo, ĉar en tia longo la duarangaj akcentoj iĝos piedofaraj. Fine tamen nur la praktiko povos montri la veran solvon!

Edwin de Kock plenumas altrangan, tre noblan pedagogian laboron per tiu ĉi nuna poemlibro. Verŝajne li sukcesis veki la intereson de la eksperimentemaj poetoj, verŝajne li fariĝos unu el la plej multe analizataj verkistoj ĝuste pro lia kuraĝo entrepreni senĉesan eksperimentadon. Li es-

tos verŝajne unu el la plej multe pridiskutataj ankaŭ en lingvistaj rondoj, eĉ akre kritikata pro neologismoj, kiel *fro, hati, pon, sob,* ktp. Samtempe li surprizas nin per multaj – tute fundamento-respektaj – lingvaj bravaĵoj' Tiuj ambaŭ ecoj fontas el lia izoliteco.

Edwin de Kock estas unu el la plej kontraŭdiraj kaj elstaraj personecoj de nia literaturo. Mi deziras al li multajn poemojn de eterne-dubanta-serĉanta-eksperimentanta homo, kiu luktas por pli bone koni la realaĵojn internajn kaj eksterajn.

Imre *Szabó*

Intelekta kaj ideoplena romano

István Nemere: La fermita urbo. Sciencfikcia romano, originale verkita en Esperanto. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1982. 128 p. 21 cm. Prezo: 13,80 ned.gld.

Sekvante la misterplenajn eventojn, kiuj disvolviĝis ekde la unuaj paĝoj de tiu ĉi originale verkita esperantlingva sciencfikcia romano, oni trovas sin jen en mezepokaj vivkondiĉoj, jen en vizio de la mil jarojn pli posta tutmonda unueca socio, inter kiuj senĉese okazadas enigma televida interkomunikado, dum kiu sinsekve vokas unu la alian Alfa, Beta, Gamma, Delta, troviĝantaj samtempe en la du diversaj mondoj. La legantoj ne tuj, eĉ ne tre baldaŭ komencas kompreni, pri kio ĝuste temas en la verko. Oni simple plu legas, ĉar estas ja interese, enigme, kaj ĉar la pluan legadon stimulas mem la lingvaĵo: klarsimpla kaj nuancoriĉa samtempe – bonega. Kiam fine venas ekkompreno pri la signifo de la tutaĵo, oni komencas senti, ke esence temas ne pri nia pasinteco kaj estonteco aparte, sed pri ni mem, kiuj el tiu pasinteco devenas, vivas nun en la intertempa epoko de la „Dividita Mondo" (tiel ĝi estas menciita en la romano), kaj strebadas al la futura mondo, nova, alia, nekonata, sed, espereble pli perfekta, espereble unueca. Ni strebadas kaj samtempe vole-nevole preparadas tiun mondon de la estonteco – per nia sciencteknika evoluado, per nia socipolitika agado, kaj pli-malpli grandskale ankaŭ per niaj personaj vivmaniero, kutimoj, konduto, eĉ sanstato. Ekzemple per la uzo de diversaj narkotaĵoj. Ĝuste la ĉi-lasta cirkonstanco gravas por la situacio prezentata en la romano. Estas la jaro 2533. La homaro estas jam unuiĝinta, unueca, gvidata de la Tutmonda Registaro. La monda ĉefurbo estas Eŭropolis. Dum sia vivo la homoj tute libere ŝanĝadas labor- kaj loĝlokojn: Nairobi, Balatonpolis, Tokio, Oceanio, Norda Eŭropo... Oficvojaĝo al Marso por partopreni konferencon tie estas ordinara afero. Multaj niaj nuntempaj problemoj ne estas eĉ konataj, ili estas simple entute forgesitaj kiel iama historio treege malnova. Sed jen foje-foje senteblas la historio, ĉar foje-foje aperadas kaj subite ekagas „genetikaj krimuloj" ĉefe kiel longdaŭra postsekvo de iama sinnarkotado de la antaŭuloj. Tiujn krimulojn la Monda Registaro kondamnas je dumviva izolo. La izolejo estas iama ŝtonminejo sub monto ie en Norda Eŭropo. Tie oni konstruis specialan subteran urbon, faris agrojn ktp. Anstataŭ la Suno la „supraj" homoj enkaj elŝaltas por la subanoj la Fajroglobon. La areo estas ĉirkaŭita de alta muro, kiu signas la finon de la ĉi tiea mondo de ĉirkaŭ mil loĝantoj, al kiuj antaŭ la alveno ĉi tien oni forigis el la cerbo ĉiun memoron pri la antaŭa vivo. Tiu ĉi malgranda punkolonio kaj readaptejo estis nomata Klaŭstropolis – la Fermita Urbo. Super Klaŭstropolis oni lokis psikopsikologian instituton, en kies personaro estas ankaŭ sciencistoj, okupiĝantaj pri psikosociologiaj problemoj de malgrandaj fermitaj homgrupoj. Ĉio iris bone laŭ la origina plano de la Tutmonda Registaro, ĝis en la instituton venas nova, talenta sciencisto. Kiel baldaŭ evidentiĝas, li mem estas esence „genetika krimulo". Eksciinte pri la ekzisto de Klaŭstropolis, li, kune kun du aliaj genetike trafitaj scienculoj, sekrete penetras en la fermitan urbon. Kaj tiam por la subanoj komenciĝas tute alia kaj terurega periodo. La triopo rapide prenas la tutan potencon en siajn manojn. Sed baldaŭ la regantoj komencas kvereli inter si, kaj sekve de tio formiĝas du kontraŭaj centroj de potenco en Klaŭstropolis. Unu el la regantoj komencas nomi sin „Princo", alia „Pastro" (la tria alianciĝas kun la Pastro). La potenculoj malamikas kaj kreas armeojn unu kontraŭ la alia. Por vivteni la armeojn kaj la grandajn servistarojn en la Palaco kaj la Sanktejo, la regantoj enkondukas ĉiam pli altajn impostojn. La vivo de la urbanojkamparanoj (la iamaj „genetikaj krimuloj" kaj ilia posteularo) iĝas fakte neeltenebla. Ili devas esti servistoj, ĉu de la Princo, ĉu de la Pastro. Natura sekvo de tio estas daŭra interbatalado, murdoj, amasbuĉado, enkarcerigo ktp. Pro la mizero la agrolaboristoj ŝteladas kaj la „princan" kaj la „pastran" rikoltojn, kaj tial ili estas severe punataj. Ĉie estas denuncantoj, regas la despota volo kaj mizero. La vivkondiĉoj estas vere mezepokaj, kiel ankaŭ la armiloj – arkoj kaj sagoj, hakiloj, bastonegoj... Intertempe venas en la supran instituton plia nova sciencisto, juna, talenta, energia, plenplena de deziro servi la homaron per sia scienca laboro. Hazarde ankaŭ li ekscias pri Klaŭstropolis, li penetras en la fermitan urbon, vidas ĉion kaj... partoprenas la kulminon de la tieaj eventoj. Li ankaŭ ekamas junan subaninon, sed ŝin trafas perforta morto. Finfine malkoviĝas ĉio, kaj atakas la fermitan urbon speciala taĉmento de la Tutmonda Registaro. La fermita urbo estas poste likvidita, ĉar dume oni eltrovis aliajn rimedojn por la „genetikaj krimuloj".

Jen la proksimuma skizo de la vere atentokapta agado, kiu lerte kombiniĝas kun profunda intelekta enhavo kaj forta estetika efiko de la konkretaj priskriboj. La ĉefa virto de la verko estas ĝuste tio, ke malgraŭ la aventura skemo ĝi estas intelekta, ideoplena legaĵo, kiu forte stimulas por plua pripensado: kio estas homo, vera homo? Kia li devus esti? Kiaspecan vivon oni povas nomi vere homa vivo? Kia sociordo estas preferinda,

ĉu la interbatalanta mezepokstila aŭ la kvazaŭ senproblema futur(ec)a? Emociplenan prezentadon de tiaj problemoj de la homa ekzistado donas la sukcesa originala romano de István Nemere. La personoj kaj la eventoj el la libro fiksiĝas en la memoron, maltrankviligante la menson. La tuto, ĉe la fino, enpensigas la tiel mense kunlaborantan leganton por longa tempo kaj pri tre profundaj aferoj, ĉefe pri jam nun tre aktualaj problemoj de la socia rolo de la scienco, de sciencista konscienco, moralo, pri la neceso de celkonscia laboro en la socio. Tiasence la romano de István Nemere estas grava averto, bonega akirajxo de la Esperanta beletro. Dankon pro ĝi al la aŭtoro.

Viktor *Gohstejn*

Sur profesia nivelo

István Nemere: Sur kampo granita. Originala romano. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1983. 21 cm. 127 p. ISBN 963 571 120 9. Prezo: 15,- ned.gld.

Oni okupiĝas pri Esperanto, ĝenerale, ekster sia profesio, ekster sia labora tempo. Tio donas grandajn avantaĝojn al nia movado: kutime oni enmetas pli da animo en la ŝatokupon, ol en la salajratan laboron. Totala profesieco farus nian komunumon ege enuiga kaj formaleca.

Tamen por teni la movadon sur inda nivelo, ni bezonas ankaŭ profesiulojn – gvidantojn, oficistojn, instruistojn, verkistojn, ĵurnalistojn, propagandistojn ktp. – kaj en multe pli granda kvanto ol nun. Tio aparte koncernas verkadon.

Iam juna, entuziasma esperantisto, rigardante mian Esperanto-bibliotekon, demandis pri iu libro: „Ĉu ĝi estas vera libro aŭ nura esperantaĵo?" La demando min gajigis kaj malgajigis samtempe. Kiom da libroj en Esperanto ne trovas sian leganton, ĉar ili estas ne libroj en la vera senco de tiu vorto, sed nuraj kunmetaĵoj de Esperantaj vortoj!

La prezentata originala romano estas vera libro. Ĝi estas verkita de profesiulo en ĉiuj bonaj sencoj de tiu vorto.

Ĝia agado disvolviĝas en du planoj interplektiĝantaj. Altranga oficisto de la Internacia Ruĝa Kruco, Martin Dregger, konscie plenumanta sian laboron pri helpo al popoloj, trafintaj en kataklismojn, estas demaskita kiel militkrimulo. Dum la dua mondmilito, estante oficiro de la germana faŝisma armeo, li ordonis mortpafi familion de italaj kamparanoj pro tio, ke ĝi kaŝis vunditan partizanon. Dregger mem iom diferencas de aliaj faŝistoj: li persone ne estas kruela, li penas konservi bonajn rilatojn kun la loka loĝantaro. Malgraŭ tio, la kamparanoj ne povas rilati al la okupantoj amikece.

Post la milito Dregger okupiĝas pri nobla laboro, penante forgesi en la animo la iaman krimon. Demaskita li veturas en la italan vilaĝon por dialogi kun la tiamaj loĝantoj. Ekestas forta psikologia konflikto. La aŭtoro finas la romanon per frazo, kiu igas la leganton cerbumi post la lego: „Ĉu la nuna bono povas forgesigi la iaman kulpon?"

István Nemere estas granda stelo, subite aperinta sur la firmamento de Esperantujo. Tiu ĉi romano estas jam lia kvara originala libro, intertempe aperis la kvina, kaj estas en preparo la sesa. Trovu indan lokon sur via bretaro por liaj libroj!

Boris *Kolker*

Kiel ginsengo akiris kuracpovon?

Knabino Ginsengo. Bildlibro. Kompilita kaj pentrita de Jiang Cheng'an kaj Wu Daisheng. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1983. 44 p. 18,5 x 16 cm. Multkolore ilustrita. Prezo por Hungario: 40,- forintoj.

La kuracherbo ginsengo estas bone konata ankaŭ en Eŭropo – ĝenerale oni atribuas al ĝi junigan efikon. Tiu ĉi nova ĉina bildlibro prezentas ĉarman fabeleton pri tio, kiel ginsengo akiris sian kuracpovon.

Okazis iam, tre antaŭlonge, ke sur la monto Fenikso kreskis iu eksterne granda ginsengo, kiu post multaj jaroj fariĝis knabineto. Tiu ĉi knabineto tre bone interamikiĝis kun la kapro, la koko, fazano, sciuro kaj cervo, kiuj vivis sur la sama monto. Ili vivis en plena harmonio, kaj ĉiuj amis unu la alian.

Foje estis granda pluvo, kiu tramalsekigis la amikojn de knabino Ginsengo. Ŝi tre timis, ke ili malsaniĝos, kaj tial laŭ la konsilo de la avo Suno ŝi iris serĉi la 80-jaran feon, kiu vivis apud la Jinguan-rivero, kaj povosciis medicinon. Post multaj malfacilaĵoj ŝi sukcesis trovi lin, kaj la maljuna feo donacis al ŝi botelon da eliksiro. Knabino Ginsengo portis ĝin hejmen, kaj ŝi donis el la eliksiro ne nur al siaj amikoj, kiam tiuj estis malsanaj, sed foje dum sekeco ankaŭ al la ginsengoj, por ke ili ne velku – per tiu eliksiro la ginsengoj akiris sian kuracpovon.

La ĉarma rakonteto estas verkita en senriproĉa lingvo, kaj ĝin akompanas ĉiupaĝe escepte belaj, kolorriĉaj bildoj. Ĝi taŭgas ne nur por infanoj, sed certe ankaŭ plenkreskaj komencantoj tre ŝatos ĝin. V. *B.*

GAJA PAĜO

La rolo de l' parolo

– Paĉjo, vi parolas ja treege triviale antaŭ nia infano – grumblas la edzino. – Retenu vin iomete, vi ne kondukas nun aŭton, nek sidas en sportejo dum matĉo...

La rolo de l' fumado

– Mi argumentas ĉie ajn, ke la fumado povas savi la vivon.

– Tamen, tamen, amiko! Ĉu vi ne troigas iomete?

– Neniel! Pasintsemajne la bezono pelis min en tabakvendejon por aĉeti cigaredojn. Dum tio, sur la trotuaro aŭto surtretis du pasantojn, unu eĉ mortis. Imagu, se mi ne fumus, eble mi jam ne vivas...

Sagaca konatiĝo

– Sinjorino, pardonu! Sed ni jam veturis foje sur la sama tramo, ĉu ne?

Agaca demando

– Doktoro! Por terapio vi preskribis duhoran marŝadon al mi. Ĉu malpli ne sufiĉus?

– Kial? Vi bezonas ja ĝin.

– Ĝuste tial! Se mi devos marŝi nur unu horon, tiam mi ne estos tiom laca, kaj mi povos pli longe marŝi...

Sagaca edzo

– Laŭ mia kompreno vi estas la plej feliĉa edzo en la mondo! Neniam mi aŭdis vin plendi...

– Prave! Ĉiuj miaj geedziĝoj estis sukcesaj!

– Mirinde! Tamen kial?

– Ĉar mi neniam atendis ĝis ili malboniĝis, kaj antaŭ tio mi jam eksedziĝis!

Paŭzo (pri la viroj)

– Sinjoro! Por mian amon akiri oni devas luktiĭ Nu... ne ektimu, nur iomete...

Kaŭzo

– Vi devas jam inviti vian fianĉon – atentigas la patrino – por ke mi konatiĝu kun li.

– Mi invitis jam lin – diras la filino –, sed li vidis jam vin kelkfoje, kaj li persistas ĉe mi!

Ne tro alte!

Dum la balsezono junulo entuziasme amindumas al... (nu, kion vi pensas?) nature, al junulino:

– Estu kara, finfine, jam la mia!

– Ne eblas, sinjoro, mia koro apartenas jam al aliulo.

– Ho, tiel alten mi tute ne strebis, fraŭlino!

Mono-tono

– Fripono! Mi devas jam vidi, ke vi edzinigis min nur ĉar mi havis monon!

– Tute ne, mia malkarulino! Ĝuste tial mi edzinigis vin, ĉar mi ne havis monon.

Okazas

– Dum la estrar-kunsido oni multe parolis pri iu nova movada talentulo.

– Certe temas pri tiu lerta propagandisto, ĉu ne?

– Jes. Do venis la tempo forpreni lian entuziasmon...

Okazos nur unufoje

– Ĉu eblas per tiu aŭto kuri tra vojkurbiĝo kun 200 kilometra rapido? – oni demandas la vendiston.

– Kompreneble, sinjoro – sed nur unufoje!

Surrealismo

– Kiam vi rimarkis, ke oni ŝtelis vian aŭton? – demandis policisto.

– Vespere, sinjoro kapitano, kiam mi forlasis la drinkejon. Mi malfermis la aŭtopordon, ensidis al la stirrado kaj volis ekigi la motoron: diable! nenie mi vidis mian aŭton!

Ne kiel la aliaj

– Ĉu vi pensas, ke Lucia ne estas tia, kiaj estas la aliaj virinoj?

– Male, ŝi estas ĝuste tia!

– Pro kio vi tiel certas?

– Ĉar ankaŭ ŝi kredas, ke ŝi ne estas tia, kiaj estas la aliaj virinoj...

Kien?

Amikinoj interparolas. Diru – demandas la blonda – ĉu vi jam ne kutimas ekskursi kun Roberto?

– Jam ne. Lastokaze li iris tro malproksimen.

Aliaj amikinoj

– Se mi edziniĝos iam, mi faros tion nur pro amo!

– Nu, se io pli konvena ne prezentos sin, ankaŭ mi...

Ho viroj!

Okazis iam – kiam kaj kie? tio restu mis-tera mistero – ke aro da viroj renkontiĝis sur insulo. Ne hazarde, ĉar ĉiuj estis fuĝintoj antaŭ aŭ post diversaj kveraj kvereloj el pajlo-tegmentaj familiejoj de aliaj insuloj. Heroa melankolio kur-aĝigis ilin, ja la kuro igis ilin aĝaj en saĝo pri la hejme lasitaj inoj. Neniam ni vidu tiujn drakinojn ! – kriis la malfeliĉaj (ho, jam feliĉaj) malinoj, kaj faris leĝon severan: ili fondas seninan komunumon, eternan, ĝi ekzistos dum la mondo daŭros kaj la suno brilos! Ĝia nomo tial estos: *Malin-sulo.*

Pasis la tempo, la suno daŭre brilis, la jaroj kaj jardekoj flugis for. La komunumo ĝuis trankvilon, sen kveraj kvereloj, sen inoj vantaj kaj kapricaj, pasie turmentantaj malinojn. Kaj niaj viroj sentis sin feliĉaj, ĉar ili vidis, ke estis intenvita la grandioza sistemo kondukanta la homaron al eterne feliĉo. Sed dumtempe ilia nombro ade malkreskis, ne-haltigeble... La trankvilo ade kreskis plu, ankaŭ la silento... gia iam la lasta ulo kaptis... f-inon.

E.F.



Ses titoloj

Ses titolojn ni kaŝis en la ĉefajn liniojn de la enigma reto. Temas pri libroj eldonitaj, eldonotaj kaj vendataj nuntempe ĉe la libroservo de HEA. Ensendi sufiĉas tiujn ses titolojn. Inter la solvantoj ni lotumos premiojn. *Limdato:* unu monato post la alveno de la revuo.

Horizontale: 2. Amromaneto de Julian Modest **16.** Okcidento – neologisme **17.** Iluzion **18.** Ago devigi iun kontraŭ lia volo **19.** Maniero kuri (R) **20.** Novelaro de Julio Baghy **22.** Antikva greka monereto (R) **23.** UTN **24.** Malŝate ridindigi iun **25.** Tranĉus **27.** Sonigilo por kordmuzikiloj (R) **29.** Perbuŝe sciigi **30.** Du adverboj **31.** Verba finaĵo **33.** Tabelvorto **34.** Ano de gento, kiu parolas Hindeŭropan lingvon kaj vivas en Eŭropa teritorio de Sovetunio **36.** Monkesto **38.** Persona pronomo **40.** Subteni kaj firmigi (R) **42.** Sicilia vulkano **43.** TO **44.** „Sago" de l' suno (R) **46.** Larmu **47.** Senigata je ĉiu ajn kromaĵo (R) **48.** Sinmovo **50.** Hungara urbo kun elektrocentralo (Inota) **52.** Reen: malrapide malsuprenigi (R) **53.** Kolektaĵo de satiraj noveloj pri esperantistoj (aŭtoro: Jan Forge) **54.** Tre malofta **55.** Prizorgi malsanulon **56.** Kunfiksi du metalpecojn (R) **57.** Ĉiu ekstrema flanko **58.** Islama lando **60.** Reen: ĉiutaga manĝaĵo **62.** Malgrandiga sufikso **63.** Pozitiva elektrodo (R) **64.** Marista distancomezuro **65.** Identaj konsonantoj **67.** Movi ion kun si **68.** Komplete **69.** TO **71.** Numeralo **73.** Regiono en Jugoslavio (R) **75.** Ne posedanta parolkapablon **76.** Pollando **77.** Skrapi kampon (R) **79.** Manlabora profesio **80.** Kuŝejo **81.** Fil' de filo **82.** Abelaj' **84.** Ekstera limlinio **86.** Plačanta al vido **87.** Loĝantoj de Eŭropa lando **88.** Cirkloforma **90.** Komercado (R) **91.** Novelaro de Eroŝenko

Vertikale: 1. Amromano de la ĉina aŭtoro Ba Jin **2.** Sperteco **3.** Specialan ludkarton **4.** Tie – hungare (OTT) **5.** Reen: radiko de V.12 **6.** Fari specialan paŝon en ŝakludo **7.** Irigi rapide antaŭen **8.** Produktaĵo de birdoj **9.** Slava virnomo (Zoran) **10.** Enigi vivan branĉeton en alian vegetaĵon (R) **11.** DT **12.** Valora metalo **13.** Pluvopromesa, kovrata ĉielo **14.** Impresi flarsenton **15.** Tri Vjetnamaj rakontoj en unu volumo **20.** Motoro de la korpo **21.** Vivanta depost nelonga tempo (R) **24.** Legendo **25.** Bosnia popolbalado, ĝia Esperanta traduko aperis paralele kun la originalo **26.** Refleksiva pronomo **29.** Speciale elformita rado **30.** 12 monatoj (R) **32.** Fariĝanta per si mem **35.** Aro de ĉielaj korpoj **36.** Reen: numeralo **37.** Kiel V.14 **39.** Mezo de lipo **40.** Eta alko (R) **41.** Specon de kantbirdo **43.** Unu el la koloroj de kartludoj (R) **45.** Loĝanto de Mediteranea lando (R) **48.** Rusa virnomo **49.** Refaldita bordero ĉe tuko **59.** Sama (R) **51.** Malpli larĝa ol ortangulo (R) **59.** Numeralo **61.** Prepozicio **62.** Reen: adverba tabelvorto **63.** Granda laŭ vertikala direkto **66.** Antikva greka teatra ŝuo (R) **68.** Akvon enhavas **70.** Radiko de V.41 **72.** Kilometro **73.** Buŝo de birdoj (R) **74.** Eklezia kunveno (R) **75.** Fatamorgano (R) **76.** V.7 en futuro **78.** La sama kiel adjektivo **80.** Sinamuzo **81.** Negacia **83.** Ludo pri feliĉo (R) **85.** Samspecaj literoj de tenoro **86.** Pola revoluciulo, generalo, internaciisto en la pasinta jarcento **88.** ...pli, des pli **90.** Maljeso

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1984/1:

Per tia klara senkomplika stilo
en diafane komprenebla brilo
aperos eĉ simbolo plej vuala.
(C.E.R. Bumy: *K. Kalocsay*)

Libropremion gajnis per lotumado: Josef *Cink*, Červena Voda, CS; Vladimir *Ebel*, Barnaul, SU; Heinrich *Nischwitz*, Bensheim, FRG.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

La blinda birdo

de István Nemere

„La blinda birdo" traktas pri la homaj rajtoj. En la centro de la romano estas la streboj de Skandia verkisto, kiu provas liberigi sian amikon, la nigran verkiston Govan Dyebo. Dyebo estas malliberigita, ĉar li publike protestis kontraŭ la senjusteco kaj perforto en sia lando, la Suda Respubliko.

1. Kiun profesion havas Oliver Meteni?
2. En kiu urbo estas la malliberejo, en kiu troviĝas Govan Dyebo?
3. Kio estas la nomo de la Skandia konsulo en Lamberta?

Limdato por la respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1984/1:

1. Citaĵo el „La maljuna cigano" de Mihály Vörösmarty.
2. Johanon Kis sufokis granda peco de viando. (Zsigmond Móricz: Tragedio)
3. „Kiam finiĝas la milito? " – novelo de István Örkény.

Libropremion gajnis per lotumado: Ulrich *Becker*, Berlin, GDR; Svetlana *Pogorelaja*, Kiev, SU.

Leterkesto

Isaj Dratwer, Bat Jam, Israelo: La dramo de *Julian Modest: Ni vivos!* – prezentita jam dum la 68a UK – temas vere pri la lastaj tragikaj tagoj de la familio Zamenhof en la getto de Varsovio. Via biografio pri la tie ankaŭ murdita Lidja Zamenhof memkompreneble havas certan temo-interrilaton kun la teatraĵo de Modest, kiu poezie kaj kun artaj, teatraj pretendoj formis sian verkon. Tamen ne forgesu, ke inter historia biografio kaj beletro staras granda distanco! La historiaj faktoj neniam estas personaj posedaĵoj, tial viaj rememoroj pri tiuj teruraj tagoj servos ankaŭ estonte kiel *fonto* kaj por historiaj, kaj por beletraj verkoj, se ili iel ajn tuŝos la vivon de Lidja. Ni esperas, ke la dramo „Ni vivos! " akiros ankaŭ vian plaĉon.

Claudia Scholz, GDR: Esperantajn libroj n el Hungario vi povos aĉeti ĉe *Haus der Ungarischen Kultur,* 1020 Berlin, Karl Liebknecht-Str. 9. (Oni korespondas nur germanlingve.) Utiligu do tiun facilan eblecon.

Maidu Allkivi, Vaimoisa, Estonio, SU: Danke ni akceptas vian ĝustigon: *Georg Hackenschmiedt* – kiun la verkisto *Lajos Nagy* menciis kiel fortegulon (HUNGARA ANTOLOGIO p. 244.) – estis fakte *estono,* fama ĉampiono komence de nia jarcento el Tartu, titolita „rusa leono". Jardekojn poste oni parte forgesis tion, kaj pro lia nomo la redaktoro de piednotoj bedaŭrinde opiniis lin germana ĉampiono, kion transprenis ankaŭ la Esperanta traduko.

Farkas Emőd, Cluj-Napoca, R: La grandioza balado „La kimraj bardoj" de *J. Arany* (aranj) estis same grandioze tradukita jam de *K. Kalocsay* (kaloĉai), do ree traduki ĝin ŝajnas superflue. Permesu, ke ni ne komparu vian tradukon... tamen, konsiderante vian aĝon de 16 jaroj, rimarkeblas surprize bona lingvosento kaj versfarado viaflanke. Elektu ne jam tradukitajn literaturajn pecojn por daŭre praktiki kaj ekzerci tradukadon. Studu tiucele eminentajn E-verkistojn kaj tradukistojn, ĉar pere de diligenta laboro kaj kreaj plezuroj akireblos serioza nivelo...

Zakrevskij Georgij, Ogre, Latvio SU: Esperanta Biblio ekzistas; bedaŭrinde nia Libroservo malhavas ĝin. Provu mendi ĝin pere de la librovendejoj Druĵba ĉe UEA.

Alexander Hanke, Güterfelde, GDR: Via frazanalizo pri la tro komplika frazo ŝajnas ĝusta, precipe el vidpunkto de stilo. Kiel kondiĉa frazo ĝi estas nepre pli klara („Nur se oni akceptus la proponojn...") ol per rekta aserto; jen denove reliefiĝas la graveco de la (klara) konceptado.

Gudajmendiev Kanatbek, Araŝan, Kirgizio, SU: Ni opinias aparte grava afero, se nia revuo konvenas al la deziroj kaj bezonoj de izolitaj esperantistoj, kio ankaŭ vi estas. Pri la difina artikolo LA, kiu ververe servas kiel montra kaj determina vorteto, estu iom grandanima. Ĝi ne devas aludi sole „vastan konatecon": ofte – kaj rajte – per la artikolo eblas aludi al *tiu* objekto aŭ afero, kiun oni jam menciis, sed ankaŭ kiun oni mencios, tuj konatigos. En titoloj, kiel „La tabakvendisto", „La aventuroj de Tom Sawyer", la artikolo aludas al *tiu* vendisto, al *tiuj* aventuroj, pri kiuj la aŭtoro tuj rakontos, do tiuj estas *konotaj.* Pri la singarda enkonduko de novaj vortoj ni plene konsentas kun vi. Koran saluton!

Glauco Corrado, Milano, I: La tre ampleksa E-prospekto kun mapo *pri Milano* estas ĝojiga fenomeno kaj brava sukceso! Niaj legantoj petu ĝin de E.P.T., str. Marconi 1, Milano, I-20. 123.

Korespondi deziras

Aktivuloj de nova klubo kun ges-anoj ktm. pĉt, resp. garantiata: Esperanto-Klubo „Espero", *Hasanov* Rozumbaj, *Urgenĉ,* do vostreb. Uzbekistano, SU-740 001. – *Kruzs* Aldona geodeziistino, pri fakaj temoj, kuirarto, kol. bk, pm, glum. *Aluksne,* Darza 1-10, Latvio, SU-228.730. – Zbigniev *Magaj* (35) instruisto de baza lernejo pri turismo, elektroniko, filo Arturo (15) pri mod. muziko, turismo, bk. *Galewice* Niviska 2, PL-98-405. – Janina *Szelinganes* instruistino de rusa, kun geamikoj, kol. bk, pk, glum. *Bielawa,* Oŝ. Wtokniarzy 7ml, PL-58-260. – 5 knabinoj (11-12) kun samaĝuloj, interŝ. bk. F-ino *Lukauskytė* Alma, *Alsėdžiai,* Plateliu gatvė, Litovio, SU-235.643. – S-ro *Farkas* Antal (32) ĉambropentristo, familipatro, pri artoj, pentroarto, kol. pm, bk. *Oradea* str. Sovata 40-A6, ap. 10. R-3700. – Zofia *Marcinkowska* (27) bibliotekistino ktm pri literaturo, naturo, politiko (ankaŭ G kaj R-lingve). *Opalenica,* ul. Pybysewskiego 8, PL-64-330. – D-ro Franciszek *Hajnos* (63) pens. instruisto ktm, kiuj konas E-stenografion. *Krakow-1* Skr. poczt. 235, PL-30-960. – F-ino *Junková* Marcela (14) ktm, pĉt, interŝ. bk de hundoj , glum. *Praha* Radotinská ul. 388, CS-159-00.

Mezlerneja Klubo „Juneco" por venontaŭtuna *ekspozicio* petas el tm bk (eble skribaĵojn) pri vidindaĵoj, monumentoj, folkloro, sporto, flagoj k.c. Resp. garant., rekompenso laŭ interkonsento. Vladimir *Masalkin,* Junusabad 8-13, kv. 28. *Taŝkent,* Uzbekistano SU-700.093. – F-ino Stefka *Borisova* (16) ktm pri arta gimnastiko, baleto, kol. etkalendar., diskoj, futbal-flagetoj. *Karnobat* str. Klisura 18, BG-8400. – S-ro *Jurkantis* Gintaras (17) kun gejunuloj ktm, pĉt, muziko, sporto, kol. bk. *Alsėdžiai,* Paupio 7, Litovio, SU-235.643. – *Neimanas* Arturas (17) ktm, pĉt. muziko, kol. bk. *Kretinga* Topoliu 6-13, SU-235.700. – Barbara *Lewandowska* (23) ktm pri vivo, turismo, muziko kc. *Skierniewice,* ul. Maczonowska 38-37. PL-96-100. – Miroslaw *Stankowski* oficisto kun inteligentaj geamikoj pĉt, kol. bk, pk, E-revuoj. *Bielawa* Os. 25-Lecia PRL 37m7, PL-58-260. – F-ino *Agrita* Kalninja (21) pri historio, muziko, arto, lit. kol. bk, pm, glum. *Aluksne* Omskas 5-6, Latvio SU-228.730. – Studento Gintaras *Žiaunys* ktm, pĉt, ankaŭ angle. *Mažeikiai,* Žemuitijos 9-25, Litovio SU-235.500.

E HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** + Arta redaktoro: **Oszkár Böhm.** + Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kőkény, Alfonso Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193. H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. + Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. + Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas ĉe ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) 78,- Ft, al eksterlando por unu jaro 96,- forintoj. + Peranto al eksterlando **KULTURA** (Budapest, P.O.B. 149, H-1389.) Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. + Presejo de Hungara Esperanto-Asocio, Budapest
Indexszám: 25 377 ISSN 0018-7704
hearota 84-0077

1984 SEP 0 6

HIFI

SM 1025 stereo senlaŭtigila magnetofono

ST 1025 stereo tuner

SE 1025 stereo amplifilo

VIA TELEFONO!
VIA TELEFONO!
VIA TELEFONO!

LA SURTABLAJ TELEFONAPARATOJ CB 811 KUN DISKO KAJ CB 812 KUN BUTONOJ.

Produktanto: H-1502 Budapest Pf. 64.

MECHANIKAI MM MŰVEK

Telefono: 669-400
Telekso: 22-5842

Eksportanto: H-1392 Budapest, Pf. 267

BUDAVOX

Telefono: 215-910
Telekso: 22-5077